# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報導

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. 1 N-RO 1
MAJ. 1950



**EN TIU ĈI NUMERO:**

Laboristoj Penegas Konstrui Novan Ĉinion

Movado por Nova Rekordo en Produktado

Nova Vivo de Liberigitaj Prostituitinoj en Pekino

Popola Eduko en Popola Ĉinio


## AL LA LEGANTOJ

Liberiĝis Ĉinio el sub la jungo de la trio de imperiismo, feŭdalismo kaj burokrat-kapitalismo. Liberiĝis la ĉina popolo el sia miljara sklaveco. Unuiĝis en batalo kaj konstruado kiel unu homo la ĉina popolo, sub la prudenta gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj la gvidanto de la ĉina popolo Maŭ Ze-tung. Ĉinio, kun sia 475 milionoj da popolanoj, jam aliĝis al la monda tendaro de paco kaj demokratio, kaj ege ĝin fortigis.

Tamen la malamikoj ne volas sin retiri el Ĉinio per si mem. Ili estas farantaj sian lastan barakton por teni sub sia regado la ankoraŭ neliberigitan ĉinan teritorion, Formoso kaj Tibeto, kaj por subfosi la Ĉinan Popolan Respublikon per komploto, blokado kaj aeroplana bombardo.

Imperiismo ne volas eniri sian tombon per si mem. Ĝi estas faranta sian antaŭmortan barakton. Ne povante ekzisti en paco, ĝi klopodas minaci en submetiĝon la pacamajn popolojn en la tuta mondo per militpreparado, subpremi la naciliberigan bataladon en kolonioj per siaj hundaĉaj pupoj kiel Bao Dai, Syngman Rhee kaj Quirino, komploti kontraŭ la popoldemokratioj kaj Sovetio per spionoj, kaj jugi la popolojn de Marŝalizitaj landoj, okupataj landoj kaj Latina Ameriko, per ekonomia kateno.

Ni ĉinoj, liberigitaj kaj konstruantaj nian feliĉan estonton, do ankoraŭ havas antaŭ ni grandan taskon batali kune kun popoloj de la tuta mondo por la plifortigo de la paca tendaro kaj fiaskigi la minacojn kaj komplotojn de niaj komunaj malamikoj.

Pacamaj popoloj de la tuta mondo devas unuiĝi por nia komuna celo, intime kunlabori kaj interŝanĝi niajn spertojn en konstruado k batalado. Por kontribui al ĉi tiu nia komuna celo per la internacia helpa lingvo Esperanto, nun publikiĝas nia bultena gazeto "El Popola Ĉinio". Ni raportos al vi niajn spertojn en konstruado kaj batalado diversspecaj kaj la vivon de la ĉina popolo diversflanka.

Krom ĝin legi k legigi, ni esperas, la entenatajn materialojn vi ankaŭ utiligu en kunvenoj, reaperigu en viaj esperantaj gazetoj kun noto pri la deveno, aŭ traduku nacilingven kaj reaperigu en viaj nacilingvaj ĵurnaloj aŭ gazetoj, notante kiujn artikolojn el kiuj numeroj de nia gazeto vi tradukis. Sendu al ni bonvole almenaŭ du ekzemplerojn de tiu nacilingva gazeto aŭ ĵurnalo, en kiu aperas iu ajn tradukaĵo.

Al tiuj, kiuj utiligas niajn materialojn, ni rekompencas per donaco de nia gazeto. Ni speciale turnas nin al TEĴA-membroj ke ili kiel laborantoj en ĵurnalista kampo multe utiligu niajn artikolojn en siaj respectivaj ĵurnaloj. Al tiuj kiuj urĝe bezonas niajn matetialojn, ni sendos nian gazeton aerpoŝte kaj se necese kune kun utiligeblaj fotoj kaj bildoj.

Eksterlandaj s-anoj, kiuj volas legi nian gazeton, povas peti nin sendi senpagan provnumeron.

Informu nin pri la efiko de la materialoj de nia gazeto kaj diru al ni viajn opiniojn. Sciigu al ni, kiaj materialoj vin interesas kaj kiajn demandojn aŭ dubojn vi havas, ke ni vin respondu sur la gazeto aŭ aparte per letero.

Leterojn aŭ salutleterojn al metiaj, kulturaj aŭ porpacaj organizoj de nia lando ni volonte transdonos.

Unuvorte, ni faru Esperanton ponto kaj ligilo inter la popoloj batalantaj por paco, demokratio kaj luma estonto. En ĉi tiu nia komuna laboro ni ĉinaj esperantistoj kontribuos nian forton per ĉi tiu nia gazeto kaj aliaj eldonaĵoj kaj servoj.

# Maja Tago En Popola Ĉinio

Kun granda gajeco la ĉina popolo celebris la unuan Majtagon ekde la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio. Krom en la liberigitaj regionoj, en la pasintaj jaroj la plejmulto el la ĉinaj laboruloj ne nur ne estis protektata sed estis severe malpermesata de la reakciaj registaroj por celebri sian propran feston. Ili povis nur celebri aŭ pasigi sian ferion en sindona lukto sub la observemaj okuloj de reakciaj trupoj, sekretaj agentoj kaj polico.

Sed la Majtago en tiu ĉi jaro estis unu el la plej gravaj oficialaj festoj. Ĉiuj fabrikoj, uzinoj, registaraj institucioj, lernejoj kaj la trupoj de la Popola Liberiga Armeo festis la tagon kiel ferion. La popolaj trupoj kaj polico, anstataŭ malhelpi la popolon okazigi celebrojn kaj paradojn, men celebris kaj paradis kune kun la popolo. La popola registaro protektis la laborantajn popolanojn kaj garantiis ke ili povis celebri sian Majan Tagon trankvile kaj tutkore. Estis la unua fojo en historio, ke la plejmulto el la ĉinaj laborantaj popolanoj celebris sian ferion en libereco kaj ĝojo kaj sub la protekto de sia registaro.

Tiu ĉi ŝanĝo signifas, ke la granda popola revolucio de Ĉinio estas sukcesinta ke la laborantaj popolanoj de Ĉinio estas liberigitaj, ke la reĝimo de la reakciaj klasoj kiuj subpremis nin kaj malestimis la laborantajn popolanojn estas renversita de la popolaj fortoj, kaj ke la laborantaj popolanoj estas establintaj reĝimon kun ili mem kiel la fundamento. Ĉi tio estas la unua kaj la plej granda venko de la ĉinaj laborantaj popolanoj en la historio.

***Parado en Pekino*** En Pekino, la ĉefurbo de nova Ĉinio pli ol 200,000 popolanoj marŝis preter la tribuno sur la historia Tien An Men (Pordego de Ĉiela Paco) antaŭ la Imperia Palaco en la plej granda Majtaga parado iam vidita en Ĉinio. Aeroplanoj disigis sloganfolietojn, kiam la marŝantoj turnis siajn kapojn por saluti Prezidanton Maŭ Ze-tung kaj aliajn registarajn reprezentantojn, kiuj staris sur la alta ruĝa pordego de la antaŭa Imperia Urbo.

Artileriaj salvoj skuis la aeron precize je la 3-a horo posttagmeze kaj post la parolado de Urbestro Njeh Jung-ĉen la parado komenciĝis. Taĉmentoj de la popolaj armeaj, maraj kaj aeraj fortoj, en siaj elegantaj, nove designitaj uniformoj kondukis la vojon, virinaj unuoj en siaj novaj kostumoj kaj netaj kepoj altiris specialan aplaŭdon.

Kelkfojaj torentoj de pluvo ne malvarmigis la entuziasmon de la marŝantoj kaj la granda amaso en la vasta placo.

Post la liberigantoj de la popolo, venis senfine kolonoj de laboristoj, kamparanoj, registaraj laborantoj, studentoj, publiksekurecaj fortoj kaj civitanoj sub miloj da flirtantaj flagoj el skarlata silko. La laboristajn kolonojn kondukis muzikbando de 500 tamburoj kaj cimbaloj, vestitaj en brilanta ruĝo, bluo kaj oro. La paradantoj portis grandajn portretojn de Maŭ Ze-tung kaj Marks, Engels, Lenin kaj Stalin. Ĉiu unuo estis salutata de Prezidanto Maŭ kaj respondis, ĵetante siajn ĉapelojn en la aeron kaj rimarkante ĝoje kiel sana Prezidento Maŭ aspektas kaj kiel forta estas lia voĉo.

Vivu la Ĉina Popola Respubliko! Vivu la Ĉina Komunista Partio! Vivu Prezidanto Maŭ Ze-tung!" Ondo post ondo de surdigaj huraoj kaj sloganoj daŭris tra la marŝado.

Esprimoj de unueco kun la laboranta klaso de la mondo estis kriegataj kun aldonata entuziasmo, kiam la marŝantoj vidis sur la estrado fratlaboristojn el aliaj landoj. "Subtenu la mondtendaron de paco kaj demokratio, kun Sovetio ĉe la fronto!" Laboristoj de la tuta mondo, unuiĝu!" "Vivu ĉina-sovetiaj amikeco, alianco kaj reciproka helpo!" Vivu la unueco de Ĉinio kaj la Popolaj Demokratioj!" "Popoloj de Azio, unuiĝu por kontraŭi imperialistan agreson!" estis inter la ŝatataj sloganoj.

***Celebroj en Aliaj Grandaj Urboj*** Amas-kunvenoj okazis en Mukden, Ŝanhajo, Tienzin, Zinan, Nankino, Fuĉoŭ kaj multaj aliaj urboj por celebri la unuan Internacian Laboristan Tagon ekde la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Inter la tondro de kanonoj, 160,000 mukdenaj laboristoj, registaraj kadroj kaj studentoj komencis la majtagan manifestacion. Ĉe la kunveno, Lin Feng, Vicprezidanto de la Nordorienta Popola Registaro, alvokis la laboristojn altigi sian produktivon kaj pliintensigi siajn studojn. Kun kompaktaj kolonoj de kavalerio ĉe la fronto, la paradantoj, multaj en siaj novaj uniformoj, marŝis tra la ĉefaj ŝoseoj en la brila majtaga sunlumo. Ornamitaj per flagoj, ŝarĝaŭtoj de multaj fabrikoj montrantaj siajn rekordojn en produktado en grandaj literoj aldonis festan atmosferon al la parado.

En Ŝanhajo, Urbestro Ĉen Ji revuis la paradon de 20,000 laboristoj. Celebraj kunvenoj kaj atletaj aktivoj okazis en multaj kvartaloj de la urbo, ĉeestataj de entute pli ol 500,000 homoj. Novaj laboristaj klubo kaj parko oficiale malfermiĝis en Maja Tago. Teatroj kaj librejoj donis specialajn rabatojn. Tienzin ankaŭ vidis impresan paradon de 40,000 laboristoj kaj registaraj kadroj en Maja Tago. Preznatdoj de operoj, dramoj, danco, filmoj kaj muziko estis donataj al miloj da laboristoj kiel parto de la celebroj.

***Nova Leĝo Publikigita*** Projekto de nova leĝo por laboristaj sindikatoj estis aprobita de la Registara Administra Konsilio kaj publikita por registaraj institucioj, sindikataj laborantoj, industriistoj, komercistoj kaj aliaj, ke ili ĝin studu kaj esprimu siajn opiniojn. Ĉi tiu projekta leĝo, kiu difinas la leĝan pozicion kaj funkciojn de la laboristaj sindikatoj en nova demokrata Ĉinio, estos prezentata al la Konsilio de la Centra Popola Registaro por fina aprobo. Iu ajn organizo aŭ individuo povas prezenti opiniojn pri la projekto al la Ministrio de Laboro antaŭ la fino de majo, kaj ĉi tiuj estos konsiderataj antaŭ ol la projekto fariĝos leĝo.

Antaŭ ĉio, la projekta leĝo klare difinas, ke la sindikatoj estas amasorganizoj de la laborsita klaso, organizataj sur memvola bazo. Ĉiuj dungataj laboristoj rajtas aliĝi al sindikatoj.

La sindikatoj havas la rajton reprezenti laboristojn partopreni en administrado de publikaj entreprenoj kaj en entreprenoj kune funkciataj de publika kaj privata kapitalo. Ili ankaŭ havas la rajton subskribi kolektivajn kontraktojn kun la administracioj en la entreprenoj.

La fonduso kaj alia propraĵo de sindikato necesaj por plenumi ĝian laboron estas ankaŭ garantiataj de leĝo. Ambaŭ publikaj kaj privataj entreprenoj devas rezervi sumojn egalajn al du procentoj de la salajro pagata al la laboristoj por la sindikatoj kaj provizi ilin per sidejo kaj aliaj faciligoj por plenumi sian laboron.

***Laborista Palaco de Kulturo Malfermiĝas*** Nova palaco de kulturo por la laboristoj malfermiĝis oficiale en Pekino en la vespero antaŭ la Maja Tago, de Ŝiao Ming, Vicprezidanto de la Konsilio de Pekina Laborista Sindikato

La palaco de kulturo estas lokita interne de la Imperia Palaco, unu el la belaj lokoj de Pekino, kie gigantaj ortagmentaj konstruaĵoj, kun altaj, pentritaj plafonoj kaj grandaj kolonoj de komplikaj skulptaĵoj, sidas en vastspaca ĉirkaŭaĵo, flankitaj de fama malnova bosko de cipreso kaj florĝardenoj.

Estas plej konvene, ke tiu ĉi antaŭa paradizo de la imperiestroj, tiuj ĉi belaj kreaĵoj de miloj da ĉinaj laborantaj popolanoj, en la Laborista Tago,

(Daŭrigota sur p. 7)

# Laboristoj Penegas Konstrui Novan Ĉinion

LIU NING-JI[1]

Nun Ĉinio jam fundamente gajnis la landskalan militon de liberigo. La liberigitaj popolamasoj en la urbo kaj kamparo jam stariĝis kaj fariĝis mem la mastroj. Antaŭ ili estas la granda tasko konstrui novan Ĉinion. Por efektivigi la ekonomian kaj pri-laboristan politikojn plej efike, la laborista klaso de nova Ĉinio estas firmiganta kaj larĝiganta siajn vicojn. La pli gravaj sindikatoj en la Ĉefaj urboj de Ĉinio jam registris kiel membrojn pli ol 50 procentojn el la tuta laboristaro de la respektivaj industrioj. En iuj lokoj registriĝo atingas 80 aŭ 90 procentojn. La Tut-Ĉinia Federacio de Laboristoj nun havas solidan, unuigitan landskalan organizon kun membraro de kvar milionoj. Establiĝis tutlandaj sindikatoj de fervojistoj, maristoj, PTT-istoj kaj transportistoj. En la proksima estonto establiĝos similaj sindikatoj por metal-laboristoj, karboministoj, nutraĵproced-laboristoj, teksistoj, munici-laboristoj, maŝininstrment-laboristoj kaj komizoj. Ĉi tiuj sindikatoj estas malfermaj al ĉiuj laboristoj en la respektivaj industrioj, kiuj volas aliĝi, tute egale kiajn sekson, aĝon, naskiĝlokon, naciecon, religion kaj kredon ili havas. Ili tute forbalais la kaoson kaj malunuecon kiuj regis inter la metigildoj sub la kuomintanga regado.

Tuj post liberiĝo, la laboristoj helpis la registaron protekti siajn fabrikojn kaj fari detalajn inventarojn de la tutaj fabrikaj propraĵo kaj ekipaĵo. Per la helpo de la laboristoj, la fabrikoj apartenantaj al burokrataj kapitalistoj transdoniĝis al la ŝtato de la popolo, ke ili povas, ekde nun, produkti por la interesoj de la popolo. Tio donis la fundamenton por la disvolviĝo de socialisma ekonomio.

Niaj sindikatoj ankaŭ helpis diversajn industriojn ŝanĝi siajn malnovajn sistemojn de operacio en novajn kaj demokratajn.

Dank'al la entuziasma subteno de la vastaj amasoj de laboristoj, komunikado restariĝas kun granda sukceso. Niaj fervojistoj respondis tutkore al la alvoko: "Kien iras la Popola Liberiga Armeo, tien devas nepre iri ankaŭ la fervojoj." En unu sola jaro, ili riparis 8,200 kilometrojn da fervojo, pli ol duobligante la antaŭpretigitan planon. Je la fino 1949, servo rekomenciĝis laŭlonge de 21,046 kilometroj el la tuto de 24,794 kilometroj da liberigitaj fervoj-linioj.

Sub la gvidado de sindikatoj komenciĝis nova movado por lokalizi kaŝitajn aŭ perditajn ekipaĵon kaj provizojn kaj redoni ĉi tiujn al la popola ŝtato. Ĉi tio kondukis al redono de grandaj kvantoj da valoraj materialoj. Ekzemple, la laboristoj de Ŝihĉingŝan Fer- kaj Ŝtal-uzino, en la antaŭurbo de Pekino, transdonis al la aŭtoritatoj ĉirkaŭ 5,000 tunojn da ŝtalo kaj fero, pli ol dek milionojn da maŝinpartoj kaj pli ol 540 specojn da fajrargilaj produktaĵoj, ampleksanta pli ol 3,500,000 pecojn. La laboristoj de Anŝan Fer- kaj Ŝtal-uzino, en Manĉurio, redonis 212,400 pecojn da maŝinaro, valoranta 2,483 milionojn da dolaroj (laŭ popola monunuo de Nordorienta Ĉinio). Karboministoj de Fuŝun, en Manĉurio, liveris industriajn materialojn valorantajn je 7 bilionoj da dolaroj (laŭ popola monunuo de Nordorienta Ĉinio). Tiaj kontribuoj havis gravan signifon por rapidigi la restariĝon de ĉiniaj fabrikoj kaj minoj.

Por reformi industrian administradon kaj produktajn procedojn, la sindikatoj mobilizis la vastajn laboristamasojn helpi en la demokratigo de fabrika administrado. Vaste organiziĝis reprezentantaj komitatoj de laboristoj. Fabrikaj administraj komitatoj, estrataj de la direktoro de la fabriko kaj konsistantaj el reprezentantoj de laboristoj kaj administra oficistaro, stariĝis en 987 ĉefaj fabrikoj kaj minoj tra la tuta lando. Ĉi tio ankaŭ altigis la senton de la laboristoj ke ili fariĝis mem mastroj, kaj rekte kondukis al pliigita laborentuziasmo kaj labor-iniciativo, dume fortigante la memvolan labordisciplinon de la laboristoj. Rezulte, produkta efikeco leviĝis, produkta kosto malpliiĝis kaj kvalito de produktaĵoj pliboniĝis.

En Nordorienta Ĉinio (Manĉurio), kiu estis tute liberigita antaŭ ol la aliaj partoj de Ĉinio, agrara reformo jam plene efektiviĝis; industrio plejparte reestabliĝis kaj iomgrade plue ekspansiiĝis. En la aŭtuno de 1949, la novrekorda movado, amaskampanjo por levi produktan efikecon, komencis akiri movforton sub la kuna gvidado de la Komunista Partio, la regiŝtaro kaj la sindikatoj. En la kvinmonata periodo finiĝanta lastan Marton, 19,940 novaj rekordoj stariĝis de 50,000 laboristoj, aŭ individue aŭ kolektive. La ĉefa emfazo de la movado nun jam transiĝis de individuaj novrekordoj al kolektivaj novrekordoj, de novrekordoj en nura pliigo de laborintenseco al novrekordoj en plibonigo de laboriloj, altigo de laborteknikо kaj pliigo de sekurecaj rimedoj. Ĉi tiu kampanjo kaŭzis grandegajn saltojn en laborproduktivo. Statistikoj por la periodo de Oktobro ĝis Septembro, 1949, montras, ke la meznombro de laborproduktivo dum ĉi tiu trimonato superis tion de Septembro je 13 procentoj. La meznombro por Decembro estis 32.83 procentojn pli alta ol tio de Junio.

Grandparte dank' al ĉi tiu kampanjo' industria produkto de 1949 en Nordorienta Ĉinio superis la jaran planon je 4.2 procentoj. Dum la sama periodo, 240,000 pliaj laboristoj kaj oficistoj dungiĝis de publike funkciataj entreprenoj.

La laborsitoj en Nordorienta Ĉinio nun luktas por la tasko plenumi aŭ superi la 1950 planon. ĉi tiu plano Prezentas pluan pliigon je 193 procentoj super lastjara nivelo en la tuta valoro de industria produkto de Nordorienta Ĉinio. Tio levos la proporcion de industria produkto de 35 procentoj en 1949 ĝis 43 procentoj en 1950 el la tuta produkto.

Norda Cinio ankaŭ faris grandegan progreson en produkto, kaj novaj produktaj rekordoj amasiĝas konstante. Ekzemple, per la helpo de sovetia konsilantoj, la laboristoj de la Nordokcidenta Ŝtaluzino, en Tajjuan, altigis sian produkton kvaronon super la plej alta nivelo atingita sub la japana aŭ kuomintang-a reĝimo.

La laboristoj en Ŝanhajo kaj tra la tuta Orienta Ĉinio sin metis en la frontaj vicoj de la batalo por prepari la liberigon de Tajvan (Formoso). Ĉi tiuj laboristoj ankaŭ staras en la fronto kontraŭ blokado kaj konstantaj aerbombardoj fare de la usonaj imperialistoj kaj la restantaj fortoj de Ĉiang Kaj-ŝek. Tamen ili surŝultrigas siajn respondecojn kaj alfrontas siajn malfacilaĵojn en maniero kiu inspiras la tutan landon. Nek la laboristoj de la nove liberigitaj regionoj en Centro-Sudo, Sudokcidento kaj Nordokcidento postlasiĝas.

En privataj entreprenoj, la sindikatoj helpas la laboristojn akiri korektan komprenon pri la registara politiko por garantii "bonon al ambaŭ laboristoj kaj kapitalistoj". La laboristoj estas kuraĝigataj por plene utiligi siajn novajn rajtojn kaj la rimedojn de interkonsiliĝo, interpacigo kaj leĝaj procedoj por defendi siajn interesojn. Samtempe, tamen, al ili estas montrita la bezono ĝustgrade prizorgi la laŭleĝajn interesojn de la administracio, por garantii plenkapacitan produkton kaj ekonomian prosperon de la lando.[2]

Oni ne povas nei, ke antaŭ ni ankoraŭ estas malfacilaĵoj kaj ke al ni ankoraŭ mankas sperto en multaj aferoj. Kiel Prezidanto Maŭ diris tiel prave, "Ni faris nur la unnan paŝon en longa militiro de 100,000 li-oj".[3] Tamen, ni havas sufiĉajn kondiĉojn por venki ĉi tiujn malfacilaĵojn. Ni havas unuigitan landon, vastan en areo, riĉan en naturprovizoj kaj multnombran en loĝantaro. Ni havas la brilan gvidadon de Prezidanto Maŭ Ze-tung de la Ĉina Komunista Partio. Ni havas la riĉajn spertojn de la laboristoj, kiuj venkis diversajn malfacilaĵojn en pasintaj jaroj. Ni havas solidarecon kaj politikan konscion inter la laboristoj kaj ceteraj ĉinaj popolanoj. Krome, ni havas la helpon de la sovetia laborista klaso kaj iliaj progresaj teknikaj spertoj. Tiel, ni povos en plej proksima estonto plibonigi niajn kondiĉojn. Ni havas antaŭ ni la eblecon plene restarigi nian industrion en tri aŭ kvin jaroj, kaj konstrui bone organizitan kaj modernan industrion en ok aŭ dek jaroj. Kiam nia industrio sufiĉe disvolviĝos ni povos tiam antaŭen paŝi de novdemokratio al socialismo.


(Iom mallongige elĉinigita.)

---

1) La verkinto estas vicprezidanto de Tut-Ĉinia Federacio de Laboristoj.

2) Ĉar Ĉinio estis antaŭe duonkolonia kaj duonfeŭdalisma lando, kapitalismo al ĝi ne troas sed mankas. En la novdemokrata eknomia konstruo, krom ŝtata ekonomio de socialisma naturo, kiu ludas gvidan rolon en industrio, kaj kooperativa ekonomio de duonsocialisma naturo, kiu kondukas al kolĥozo en agrikulturo, ni ankaŭ permesas kapitalisman ekonomion disvolviĝi sub rigora gvidado por la bono de ekonomia konstruo. La popola regpotenco kaj la gvida rolo de ŝtata kaj kooperativa ekonomioj garantias, ke la kapitalisma elemento en la novdemokrata ekonomio ne malhelpas sed akcelas nian marŝon al socialismo. Kapitalismo likvidiĝos nur kiam ni atingos socialismon. (tradukinto).

3) Li (ĉina mezuro de longo por vojoj) = $\frac{1}{2}$ kilometro (tradukinto).



*Anŝan Fer- kaj Ŝtal-uzino Restarigita* — *Li Hŭa*

# MOVADO POR NOVA REKORDO EN PRODUKTADO

La ĉina popolo jam liberigis sin el sub la subpremado kaj ekspluatado de imperialistoj, burokrat-kapitalistoj kaj feŭdalistoj. Tamen, kiel Prezidanto Maŭ Ze-tung diris, ni faris nur la unuan paŝon de longa militirado de dekmil lioj. Ekonomie Ĉinio ege postlasiĝas. En novdemokratia konstruado restas antaŭ ni granda tasko industriigi nian landon, ĉar nur industriigita Ĉinio fariĝos ekonomie tute sendependa.

La tuta popolo, nun kun firma kredo batalas por efektivigi tiun grandiozan taskon. Kompreneble la laboristaro ludas gvidan rolon en la batalo. La movado krei novan rekordon en produktado estas unu el la klopodoj de la laboristaro tiuflankaj.

La movado komenciĝis de lasta julio en la Tria Ŝtata Maŝin-fabriko de Mukdeno. Tiam la pionira laboristo Ĉao Kuo-ju rompis per unu horo kaj 16 minutoj la ok-horan rekordon en fabrikado de konusa pulio. La Industria Ministrio de la Popola Registaro de Nordorienta Ĉinio (Manĉurio) tion rimarkis kaj baldaŭ poste publikigis alvokon al la laboristoj ke ili lernu de Ĉao Kuo-ju.

La sukceso de Ĉao Kuo-ju estis vaste diskonata. La registaro donis al li laŭdojn kaj premion. ĵurnaloj dediĉis grandan spacon por tiu sukceso kaj speciala filmo estis fotografiitaj pri ĝi. Tio donis grandan instigon kaj edukon al aliaj laboristoj. Per tio disvastiĝis la movado tra la tuta Nordorienta Ĉinio. Novaj rekordoj kreiĝis ĉiutage. En la farado de ĉefa helico por sesfuta maŝintornilo Tang Hui-an per du horoj kaj 30 minutoj rompis rekordon de 30 horoj, t.e. mallongigi la laborhoron je naŭ dekonoj. Eĉ Ĉang Kui-ŝih antaŭe primokinto al klopodo de Ĉao Kuo-ju fariĝis entuziasmulo al laboro, li ne forlasis sian laboron eĉ kiam liaj kruroj sveliĝis pro longtempa laborado.

Tiu ĉi movado penetras ne nur la pezan industrion sed ankaŭ la malpezan. Ĝi disvastiĝas tra fabrikoj, minejoj, sur fervojoj, en komercaj fakoj, ĉie leviĝas ondoj por nova produkta rekordo.

Kompreneble en moderna industrio la produkto en iu fako ne povas esti multe antaŭenpuŝata sen ŝanĝo en aliaj fakoj. Tial sub gvido de "pioniraj produktantoj estiĝas serio da transformiĝoj sur la produkta fronto. Tion plene montras la produkta konkurado en Antung-a Paperfabriko. Tiu fabriko estis plene ruinigita de kuomintang-banditoj. Post liberiĝo ĝi rekonstruiĝis kaj refunkciiĝis. Laboristoj sub la nova alvoko manifestis sian novan forton en la produktado. Unue la laborsistoj en paperfarado rapide forigis la limakan produktan metodon kaj kreis rapidecon multe pli altan ol tiu akirita sub Kuomintang-a regado.

Sed estiĝis tuj problemo, ke la produktivo de paperpulpo ne estas sufiĉe alta por provizi materialon al la paperproduktado. Tio instigis la laboristojn en la pulp-prokukta fako. Ili komencis studi la aferon kaj post kelkaj tagoj ili trovis novan metodon, per kiu oni povas produkti trogon da paper-pulpo en 4 horoj. La tag-produkta kvanto multe superis bezonon de la paperfarado. Kaj tio siavice donis instigon al la laboristoj en la lasta fako.

En tia reciproka instigado la movado disvolviĝas de karaktero individua al kolektiva kaj estiĝas vera produkta revolucio.

En la komenco kelkaj inĝenieroj kaj administrantoj konservativaj tre dubis, ĉu ni povus atingi la produktan normon fiksitan de Manĉuria pup-reĝimo dum japana okupado, sed faktoj ilin surprizis. Ekzemple, la 3-a Ŝtata Maŝina Fabriko de Mukdeno planis fabriki 30 maŝinojn en lasta septembro, sed la laboristoj altigis la celon ĝis 40, kaj fine 45 maŝinoj estis fabrikitaj je la monatfino. En Fuŝun Karbminejo la tagprodukto altiĝas de 1,080 tunoj ĝis 3,030 tunoj. Unu el ĝiaj karbfosaj grupoj gvidate de Ĉeng Ven-ju eĉ atingis tagprodukton de 15 tunoj ĉiupersone. La rapideco de Tang Hui-an en la farado de ĉefa helico por sesfuta maŝintornilo jam trioble superis la normon antaŭe difinitan dum japana okupado. En ĉiuj fabrikoj la laboristoj kriis: "For la normon kolonian, kaj kreu la nian!" Fine la inĝenieroj kaj la konservativaj administrantoj devis konfesi: "Ni povas kalkuli la teorian efikon sed ne la entuziasmon de labristoj."

En ĉi tiu movado estas miloj da plibonigoj kaj eltrovoj de la laboristoj mem pri la produktaj instrumentoj. Ankaŭ la adminstrado kaj labor-organizado multflanke transformiĝas. Ekzemple, en Bensi-karbminejo pro eltrovo de nova metodo por karb-fosado la administranto devis regrupigi la laboristojn kaj 100 ministoj estis transsenditaj al alia minejo, ĉar per la nova metodo ĉiu laborgrupo povas plenumi sian taskon per malpli da laboristoj. Tial anstataŭ malalitiĝo la tagprodukto de tiu minejo per malpli multe da laboristoj pliiĝis de 2,300 tunoj ĝis 3,000 tunoj. Tiu movado iendube unue altigas la produktivon en ĉsuj industrioj. Sed oni ne devas opinii ke la kvalito rilative malboniĝas pro tio. Male, ĝi estas samproporcie altigata. Ekzemple, en la 5-a Ŝtata Maŝina Fabriko de Mukdeno la monat-produkto altiĝis je 75%, dume la proporcio de subnormaj produktaĵoj malaltiĝis de 1.59% ĝis 0.65%. En la Nordorienta Kemia Medicina Fabriko Sun Ĉing-ven eltrovis metodon nutri laktaton de mikrobo per kapsiko kaj pro tio la produkto de laktato de kalcio pli altiĝis 266% kaj kvalite altiĝis de 94% ĝis 98%. Per altigoj en tiuj du flankoj la movado ŝparis por la nacia kaso nemezureblan elspezon. Sole en Bensi-Minejo dank, al plibonigo pri karbfosado 360,000,000 ĉinaj dolaroj estas ŝparitaj ĉiumonate kaj en Hogang-Minejo 400,000,000 monate.

Kio pli grava al la nacia industriigo estas tio, ke la laboristoj en la movado plene forĵetis la feŭdan labor-vidpunkton. Ili ne plu tenas iajn ajn teknikajn sekretojn al aliaj. Male, kiam nova metodo estis trovita kaj pruvita, ĝi fariĝas tuj publika kaj aplikiĝas en samspecaj fabrikoj. Tiuflanke, la pionira produktanto Vang Jan-lun fariĝis modelo kaj estas premiita pro tio.

Granda parto el la sukcesoj atingitaj en la movado nun ankoraŭ restas en Nordorienta Ĉinio, ĉar tiu regiono liberiĝis plifrue kaj administrantoj kaj laboristoj tieaj havas jam du jarojn'da spertoj kaj trejnado. Kaj tio ebligis la efektivigon de pionira tasko en prokuktado.

En aliaj partoj de Ĉinio, malgraŭ la fakto ke la urĝa tasko kaj ĉefa peno ankoraŭ restas en la kampo de restarigo de indûstrioj ruinigitaj dum la longdaŭra intensa milito, tamen la laboristoj en apartaj lokoj ne longe restas malantaŭe.

Jam en la komenco de la kuranta jaro la movado penetris en Ĉahar-provincon. En Ŝtata Vinfabriko en Kalgano, ĉefurbo de tiu provinco, kreiĝis sinsekve 10 novaj rekordoj en tri monatoj kaj la produktivo altiĝis 275% ol en 1948. En Tienzin, Ŝihĉiaĉuang kaj Pekino laboristoj en ŝtatoj fabrikoj ankaŭ respondis al tiu movado kun alta entuziasmo. Ili komencis konkuradon en la plibonigo de labormetodoj, altigo de kvalito, ŝparo de materialoj kaj malaltigo de produktkosto. En la konkurado, la produktivo en ĉiuj fabrikoj altiĝis. En Jankina Paper-fabriko en Pekino la tagprodukto altiĝis de 147 rismoj ĝis 289 rismoj. Komunika Fabriko en Ŝihĉiaĉuang ŝparis 1,239.6 laborhorojn en la plenumo de sia plano. En Tienzin la Ferfadena Fabriko nur en unu semajno post la konkurado akiris 19 novajn rekordojn.

Precipe labristoj sur fervojoj ne multe postlasiĝis post siaj nordorientaj fratoj. Ekde ĝeneraliĝo de respondeca sistemo en veturigado de trajnoj la nordorientaj fervojistoj faris miraklojn en la laboro. Ili longigis la funkciantan tempon de lokomotivoj. La lokomotivo "Ferbovo" kuris jam 106,579 km. sen granda riparo en ok monatoj, kaj la heroa lokomotivo "ㄨT631" eĉ kuras 180,000 km. sen granda riparo. Multaj lokomotivoj superas la difinitan kurdistancon de 50,000 km. Krome, karbo kaj lubrikaĵo por la lokomotivj multe ŝpariĝis por la sama kurdistanco. Imitante la bonajn ekzemplojn, fervojistoj en ĉiuj ĉefaj linioj tra la tuta lando entreprenas efektivigon de tiu sistemo. Nun sur Pekin-Tienzina linio, Pekin-Paotoŭ-a linio, Pekin-Mukdena linio, Tatung-pucoŭ-a linio, Ĉengĉoŭ-a sekcio, kaj Pengpu-sekcio de Tienzin-Pukoŭ-a linio multaj lokomotivoj funkciantaj laŭ tiu sistemo konkuras en sekura kurado, kun bonzorgo pri lokomotivoj kaj eltrovo de novaj labormetodoj.

Sendube tiu ĉi movado estas ankoraŭ en la komenca etapo, precipe en la provincoj liberigitaj autaŭ nelonge. Tion ni povas rimarki per la statistiko de novaj rekordoj en produktado, ke 60% el la sukceso estis kaŭzitaj pro altiĝo de laborstreĉo kaj 40% pro eltrovo de novaj labormetodoj kaj novaj instrumentoj. Laborstreĉo havas sian naturan limon kaj por zorgo pri sanstato de la laboristoj la registaro ne permesas troan altigon tiuflanke. Sed por la eltrova de novaj labormetodoj kaj instrumentoj restas ankoraŭ vasta kampo. Jen tasko en pli alta etapo de la movado. Konstatinte la atingojn en kelkaj monatoj ni povas diri, ke pligrandajn sukcesojn ni akiros, ĉar la entuziasmo de laboristoj tion garantias. Tian entuziasmon oni povas trovi nur en landoj kie leviĝas la laborista klaso kaj la regpotenco estas en iliaj propraj manoj. Landoj kun tia laboristaro estas nehaltigeblaj en paca konstruado kaj nevenkeblaj en pac-defendo.

***Honfan***

## *Deklaracio Subtenanta Mondpacon*

Ni entuziasme subtenas la alvokon de la Konstanta Komitato de la Mond-Paca Kongreso: postuli senkondiĉan malpermeson de atomaj armiloj, postuli rigoran kontrolon super la efektivigo de ĉi tiu decido kondamni la registaron kiu unue uzos ĉi tiujn armilojn, kaj definitive deklari ĝin militkrimulo.

Nun la popoloj de la tuta mondo, amantoj de paco kaj demokratio, estas unuigitaj ĉirkaŭ la sovetia popolo, fortikaĵo de paco, kaj luktas persiste por kontraŭi la militinstigantojn kaj gardi mondpacon. Ilia potenco estas kreskanta.

La popoloj de la tuta mondo pli kaj pli komprenas: por garantii pacan laboron, socian prosperon kaj la progreson de la homaro, oni devas batali persiste por gardi mondpacon, akiri nacian sendependecon kaj popolan demokration. Ni firme kontraŭas la agojn de la imperialistoj kiuj intencas regi kaj sklavigi la popolojn de la mondo per la uzado de atomaj armiloj por buĉi sennombrajn senkulpajn popolanojn. Ni firme kontraŭas la militfabrikistojn kiuj, por siaj propraj profitoj, subpremas la popolojn de la koloniaj kaj dependaj landoj postulantajn nacian sendependecon kaj ekigas agresajn militojn. Ni entuziasme subtenas kaj partoprenas la justan militon kontraŭ agreso por nacia sendependeco, paco kaj demokratio.

Por venki la japanan imperialismon, venki la kuomintangajn reakciulojn kaj elpeli la fortojn de agreso de usona imperialismo el ĉina teritorio, la ĉina popolo entreprenis la grandiozan antijapanan militon kaj la popolan liberigan militon, pagis altan prezon kaj fine gajnis brilan venkon. Nun ni obligas nian penon por subteni la Popolan Liberigan Armeon liberigi Tajvan (Formoso), Hajnan-Insulon kaj Tibeton, elimini ĝisfunde la restantajn fortojn de kuomintangaj banditoj kaj kompletigi la grandiozan taskon por liberigi la tutan landon. Ni ankaŭ uzas nian tutan forton partopreni en la novdemokrata konstruado de Ĉinio. Ĉar ĉio ĉi estas nun la efika ago de la ĉina popolo por defendi mondpacon. Ni alvokos la popolon de tuta Ĉinio Klopodi eĉ pli pene por kuniĝi intime kun amantoj de paco kaj demokratio tra la tuta mondo per ĉia praktika kaj efika rimedo por batali per nia plej granda forto por la defendo de mondpaco, gajno de nacia sendependeco kaj popola demokratio.

La Tut-Ĉinia Federacio de Laboristoj,
La Tut-Ĉinia Federacio de Demokrataj Virinoj,
La Tut-Ĉinia Federacio de Junuloj, kaj
La Tut-Ĉinia Federacio de Studentoj.

18-an de aprilo, 1950

## "Almozulo......"

*(daŭrigo de p. 5)*

Kiam la kuomintanga kampanjo estis dispecigita kaj iliaj fortoj repuŝitaj al la ĉefaj fervojaj centroj, Han Ŝju-cung refoje ricevis altan laŭdon pro sia laboro sub la batalaj kondiĉoj. Post nelonge, ŝi estis elektita modela distriktestro.

Kiam la preparado por la Batalo de Hsuĉoŭ estis farata, al Han Ŝju-cung estis asignita la laboro de kolektado kaj transportado de 240,000 kilogramoj da greno al la fronto. Ŝi tuj kunvokis multajn popolamasajn kunvenojn, klarigante la gravecon de la transporto de la armea greno.

"Nun," ŝi diris al la popolo, "ni havas sufiĉe da tero. Ni bone manĝas. Ni havas bonajn vestojn kaj jam aĉetis plug-bestojn dank'al la mono pruntita de nia registaro. Ni vivas sufiĉe feliĉe, ĉar ni jam liberigis nin mem. Ĉiu en la regiono nun devas labori tage kaj nokte por subteni la Popolan Liberigan Armeon, por ke ni povu alporti la saman prosperon al tuta Ĉinio."

La popolo respondis al ŝia alvoko kun tia entuziasmo, ke la tuta kvanto da greno estis kolektita, ŝarĝita sur sesdek grandaj bovĉaroj kaj sendita malproksime al la sudo en daŭro de naŭ tagoj. La plialtaj oficistoj ja konjektis ke la tasko bezonos unu monaton.

Jen kiel Han Ŝju-cung kaj la popolo de Ĉenvu-distrikto donis sian gravan kontribuon al la grandioza venko ĉe la Huaj-Haja Fronto (en regiono oriente de Huaj-rivero ĝis la maro), kiu pavimis la vojon por transpasi la Jangze-riveron kaj liberigi tutan Ĉinion.

Kvankam la laboro de Han Ŝju-cung igis ŝin tutlande famkonata kaj alportis al ŝi grandan honoron, ŝi bone scias ke ŝi ŝuldas ĉiujn siajn sukcesojn al la forto de la popolamasoj kaj la gvidado de la Komunista Partio. Ŝi neniam forgesas sian vivon en la malnova socio. Tiam ŝi laboris same penege kiel nun, sed la rezulto estis nur vivo malsata kaj malriĉa. Tiel ŝiaj propraj spertoj pruvis kiel kolosa estas la diferenco inter la malnova Ĉinio kaj la nova.

Tradukita de Pandiŝo

# NOVA VIVO de
# la Liberigitaj Prostituitinoj en Pekino

*HOWENS*

Malfrue en la posttagmezo de la 21a de Novembro, 1949, la Konferenco de la Reprezentantoj de Ĉiuj Rondoj en Pekino faris historian decidon por likvidi la prostituadon en la ĉefurbo de la nova Popola Respubliko. Tiu-vespere la Popola Urba Registaro komencis la efektivigon de tiu ĉi decido.

En le daŭro de unu nokto 237 prostituejoj estis fermitaj kaj 1,290 prostituitinoj estis liberigitaj el iliaj humiligitaj vivoj kiel ludiloj de la pliriĉaj klasoj. La aĝoj de la virinoj estas de 13 ĝis 53, dum la plimulto (756) estas inter la aĝoj de 18 kaj 25.

La prostituitinoj estis kondukitaj al la Produkta kaj Eduka Institucio por virinoj, la registara organizaĵo speciale kreita por efektivigi la taskon reformi la virinojn en utilajn kaj mem-respektajn civitanojn.

Ne estas facila afero por tiuj ĉi antaŭaj prostituitinoj sin alĝustigi al sia nova kolektiva vivo aŭ sin dediĉi al serioza studado. Ĉi tiuj knabinoj, plejmulte el ili inter la aĝoj 18 kaj 25, estis antaŭe la elĵetuloj de la socio: venditaj en bordelojn, batataj, narkotigataj kaj malsatigataj en submetiĝon. Iliaj vivoj estis en la manoj de senkompataj bordel-posedantoj. Por ili la registara aŭtoritato signifis la terorismon de etoficistoj de la Kuomintang, kiuj vivis grasan vivon el iliaj suferoj.

Ili ne povis kredi ke iu ajn ilin helpus kaj hezitis antaŭ la reprezentantoj senditaj de la popola registaro. Oni diris al ili, ke la komunistoj sendos ilin al peza laboro aŭ distribuos ilin al laboristoj, kiuj estas tro malriĉaj por havigi al si edzinojn. Tial ili fatalisme respondis al la nova okazintaĵo kaj preparis por aŭ pasiva aŭ aktiva rezistado.

Neatendite, eĉ je la unua tago, oni diris al ili, ke se ili volas, iliaj infanoj aŭ patrinoj povas veni kaj kunvivi kun ili. Ili perpleksiĝis. Tiam oni kuraĝigis ilin paroli pri siaj pasintaj spertoj. Plej multe el ili silentis en la komenco, timante paroli pri sia pasinteco, ĝis unu aŭ du stariĝis kaj pasie denuncis la homojn kaj la sistemon, kiuj respondecis por iliaj suferoj. Vidante ke iliaj vortoj elvokas simpation anstataŭ malestimon, la ceteraj baldaŭ komencis paroli libere, la unuan fojon en siaj vivoj.

Ĉe unu el la plendo-kunvenoj, en kiuj ili parolis pri siaj pasinteco kaj denuncis siajn subpremintojn, unuflanke en la granda halo estis mil eksprostituitinoj, aliflanke ĉirkaŭ 200 antaŭaj posedantoj de bordeloj kaj sur la alta estrado estis neniu alia ol Hŭang Hsu-ĉing kaj iu virino Hej Mutan (Nigra Peonio), du el la pekinaj plej abominindaj prostituistoj. Gardistoj staris ĉirkaŭe por malhelpi la knabinojn de korpa perforto al siaj malamikoj.

Altastatura knabino, forta kaj bela, iris unua al la estrado por ilin akuzi.

Ŝi rakontis kiel, post kiam ili kaŭzis al ŝi aborton, ili devigis ŝin akcepti virojn la saman tagon; kiel ili enfermis ŝin en malluman malvarman ĉambron sen manĝo kaj lit-kovrilo; batis ŝin senkonscia kaj revivigis ŝin per akvo por denove ŝin skurĝi.

"Ĉu vi memoras Hung Ju (Ruĝa Jado)?" ŝi diris. "Kiel vi ŝin batis, senvestigis kaj genuigis sur lavpelvon, kun rizpelvo kaj manĝvergoj ekvilibritaj sur ŝia kapo dum horoj, kaj poste kiam vi ambaŭ dormis, ŝi ŝtelis iom da opio kaj englutis sufiĉe por mortigi sin mem. Mi vidis vin tion fari. Vi ne povas tion nei."

Ŝi rakontis, kiel iu knabino, estis malforta pro malsano, kiam Huang ordonis sian serviston ŝin elporti kaj enterigi. "Ŝi flustris al vi el sub la litkovrilo, 'Ne enterigi min! Mi ne mortis ankoraŭ, kaj vi ŝtopis ŝian buŝon per kotono kaj sendigis ŝin por esti enterigata viva."

En tiu momento la knabinoj, kies kolero estis kreskinta, provis svarmataki la estradon kaj momente ŝajnis ke ili superus la gardistojn. Kiam denove kvietiĝis, unu post la alia ili iris al la estrado por plendo. Ili rakontis siajn terurajn historiojn esti vendataj kaj aĉetataj, vidi proprokule murdojn, suferi torturojn, kaj esti "kuracataj" de sifiliso per varmega gladilo, papriko kaj bolanta akvo. Kiam ili parolis kaj ploris, iliaj kolegoj malsupre ekkriis en ritma ĉanto: "Ne ploru, fratino. Nun ni havas nian registaron malantaŭ ni. Ne ploru, fratino. Rakontu vian historion."

Ĉe sanoekzamenoj, komence ili ĉiuj deklaris ke ili ne havas malsanojn. Tio estis ilia natura reakcio, ĉar en la estinto Kuomintangaj oficistoj eldevigis grandajn subaĉetojn por ne raporti kazojn de gravaj veneraj malsanoj.

Bezonis tempon ilin persvadi, klarigante al ili ke la sola celo estas ilin kuraci, kaj finfine ili submetiĝis volonte al la ekzameno. Ĉiuj krom 79 el ili, oni trovis, suferis pro malsano kaj multaj estis sindonantoj al narkotiko. Ne konsiderante la elspezon, la medicina fako el 160 doktoroj, flegistoj kaj medicinaj laborantoj luktis por la tasko ilin sanigi. Ĉiuj tiuj medicinaj laborantoj penlaboris tage kaj nokte, libere uzante la plej kostajn medikamentojn, kiel ekzemple penicilinon.

Estis la zorga kaj sincera laboro de la registara personaro, kiu havis la plej grandan efekton sur ili. Iom post iom ili vidis, ke la registaraj kadroj vivas simple, volonte faras ĉiam laboron por ili, estas nekorupteblaj kaj sincere volas helpi ilin reveni al deca vivo.

Ok dek procentoj el la virinoj estis analfabetoj, kiam ili alvenis al la institucio. Se la bordel-posedantoj iel ajn elmetis iom da mono por ilia edukado, tio estis nur por trejni ilin ludi muzikilojn kaj kanti aŭ danci. Sed du monatoj post la virinoj estis liberigitaj, ĉiuj havis ian scion de skriblingvo kaj kelkaj jam povis legi kaj skribi pli ol 300 ideografojn Pli multe ol 100 el la virinoj skribis pri sia nova loko en la socio por memor-festi la Novan Jaron. Ili ankaŭ verkis serion da mallongaj dramoj baziĝantaj sur iliaj vivoj, kiujn ili ludis dum la libertempo.

Dramo tute skribita kaj ludata de eksprostituitinoj estis prezentata en plenplena halo du fojojn ĉiutage ĉe la fino de Marto ĉijare. Ĝi estas simpla dramo, nomita "La Glaciigita Rivero Degelis," pri la vivoj de prostituitinoj en Pekino kaj kio okazis al ili post la liberiĝo de la urbo.

Unu el la ĉefaj aktorinoj, estas 17-jara Vu Juling, kies kamparana familio devis vendi ŝin al bienulo dum malsatega jaro. Poste li vendis ŝin por kelkaj uncoj da oro al pekina bordel-posedanto nomita Hŭang Hsu-ĉing, kiu mortigis kvin knabinojn pro diversaj kialoj—du el kiuj li enterigis vivaj. Aĉkolora cikatro sur la frunto de Vu Ju-ling kaj aliaj sur ŝia korpo atestas kelkajn el la kruelaĵoj kiujn ŝi iam suferis.



*Ŝpinado* *Ĉi Kŭejŝeng*

La impreso de la dramo estis tiel granda, ke oni petis ilin ĝin ludi publike por helpi la publikon ankaŭ kompreni la problemon.

Kiam la novaĵo pri la institucio disvastiĝis, fabrikaj laboristinoj en Pekino sendis delegitojn interparoli kun la knabinoj kaj kuraĝigi ilin lerni metiojn kaj ekpreni laboron. Poste ĉi tiuj laboristinoj sendis al ili leterojn, esprimante admiron je ilia diligenteco en memedukado.

Pli ol 400 el ĉi tiuj knabinoj jam forlasis la institucion kaj komencis labori en sia nova vivo. Ilian sintenon plej bone resumis unu el ili parolante ĉe kunveno en la institucio. "Nun mia kapo leviĝas," ŝi diris, "Kio estas la sorto? Kio estas malbona ŝanco? Ne estas tia aĵo. Estis mia bopatrino, kiu pelis min al la bordelo. Estis la bordel-posedanto, kiu torturis min. Ili vivis sur mia karno, la sangosuĉantoj! Estas kun tiaj uloj, ke ni devas reguligi la kontojn! Vidu kiel bone estas esti laboristo—vivi honore per la laboro de siaj propraj manoj. Jen kion mi faros."

---

## VIRINOJ EN NOVA ĈINIO

Artikolo de Teng Jing-ĉao, Vicprezidanto de la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Virinoj
(iom mallongige tradukita)

La emancipitaj virinoj de Ĉinio estas enviciĝintaj en organizitan laboron en ĉiam pliiĝanta nombro. En Pekino, la virina membraro de laborista sindikato ampleksas 85 procentojn el la tuta nombro de laboristinoj; en Tienzin, 95 procentoj de la laboristinoj estas organizitaj; dum en lokoj kiel Mukdeno, Porto Arturo, Dajren, Ĉangĉun kaj Harbin en Nordorienta Ĉinio, meznombro de 79 procentoj el la laboristinoj jam aliĝis al sindikatoj.

Ilia produkta kompetenteco ankaŭ ege pligrandiĝis. Laboristino faranta izolitajn elektro-instrumentojn en Fuŝun, Nordorienta Ĉinio, produktis 40 ĝis 60 pecojn ĉiutage sub la Kuomintanga reĝimo. Nun, post liberiĝo, ŝia produkto estas de 100 ĝis 140 pecoj ĉiutage. La laboristinoj de la Taŝing-Teksejo, en Ŝiĥĉjaĉuang, ne nur pliigis sian produkton, sed fariĝis instiga forto en la "ruĝflago" produktkonkura kampanjo, kiu rezultiĝis en ok procentoj da pliiĝo en la tuta produkto de la uzino. En Nordorienta Ĉinio, pli kaj pli da virinoj eniras pezan industrion. Lernante mastri modernan produkttekn ikon, ili elmontras senkomparan paciencon kaj persistecon en venkado de diversaj specoj de malhelpoj kaj malfaciloj antaŭ virinoj, inkluzive tiajn handikapojn kiel fiziologiaj limigoj kaj feŭdaj ideologiaj antaŭjuĝoj kontraŭ virinoj. Estiĝis multaj modelaj laboristinoj, kiel lokomotiv-irigisto Tien Kuej-jing, tornilisto Ĉi Kuej-zu kaj arganisto Ĉou Feng-jing. Virinoj ne nur rapide mastris la bezonatan teknikon kaj montris elstarantan laborentuziasmon sed ili ankaŭ pruvis sin "bonaj filinoj de la Komunista Partio." Ezemple, Ĉao Kuej-lan, kemia teknikistino, manipulante eksplodan fulminaton de hidrargo, suferis severan vundon por eviti endanĝerigon de siaj kunlaborantoj kaj la maŝinaro en sia fabriko.

Lastjare de 50 ĝis 70 procentoj el ĉiuj kamparaninoj en la malnovaj liberigitaj regionoj okupiĝis en agrikultura produktado. En regionoj, kie organiza laboro pli sufiĉe efektiviĝis, ĉi cifero atingis 80 procentojn.

Reciproka helpo en produktado estas pli vaste uzata ol antaŭe kaj plue disvolvita. Krom tradicia plantado, rikoltado, semoselektado kaj aliaj specoj de kulturado, agrikulturaj laboristinoj pene lernas la mastradon de moderna agrikultura tekniko. En ŝtatfarmoj en Norda kaj Nordorienta Ĉinio, multaj virinoj kiel Liang Ĉun kaj Huo Ĉi-jing jam lernis irigi traktorojn. Ŝultro-ĉe-ŝultre kun la viroj, ili luktas por plenumi la grandan taskon de 1950 por pliigi grenproduktón je 5 milionoj da tunoj kaj kotonproduktón je 238,000 tunoj.

Sep procentoj el la membroj de la Nacia Komitato de la Ĉina Popola Politika Konsultiĝa Konferenco estas virinaj membroj. Virinoj estas ankaŭ elektitaj aŭ nomitaj al la Centra Popola Registara Konsilio, al la Militaj kaj Politikaj Konsilioj en la kvin grandaj regionoj de la lando, same kiel al diversaj niveloj de la popolaj lokaj registaroj. Virinaj kadroj konsistigas 20 procentojn el la tuta nombro de publikaj funkciuloj laborantaj en la Centra Popola Registaro. Virinoj ankaŭ aktive partoprenis en diversaj popolaj reprezentaj konferencoj, kiuj okazis en plejmulto de gubernioj kaj municipaloj de 21 provincoj. Kiam 32 urboj okazigis tiajn konferencojn dum la dua duono de 1949, virinaj delegitoj ampleksis almenaŭ 5 procentojn el la tuta delegitaro en malgrandaj urboj, kaj de 10 ĝis 15 procentojn en pli grandaj urboj.

Ĉi tiuj faktoj liveras la plej bonajn ilustrojn, kiel efektiviĝas la Komuna Programo de la Ĉina Popola Politika Konsultiĝa Konferenco por garantii la plenan emancipon de virinoj.

# Almozulo Fariĝas Distriktestro

Fu Ljen

### VIVBATALO DE ALMOZULINO

"En liberigita Ĉinio, tute ne gravas ĉu vi estis almozulo aŭ instruitulo. Via pozicio en la socio estas decidata nur laŭ tio, kiom multe vi servas al la popolo."

Kiam Han Ŝju-cung, la vicdistriktestro de Ĉenvu-distrikto, Pohin-gubernio, en nordokcidenta Ŝantung-provinco, faris ĉi tiun komentarion, ŝi esprimis ne iun ajn abstraktan principon, sed parolis pri fakto—tre konkreta fakto enkorpiĝinta en la sperto de ŝia vivo.

Han Ŝju-cung estis naskita en familio de almozulo, kaj dum la unuaj dudek jaroj de sia vivo, ŝi vivis ĉefe dank'al almoz-petado. Dum sia junaĝo ŝia patrino vivis ĉe iu bienulo kiel sklava knabino, kaj ŝia patro estis senagra kamp-laboristo, kiu povis trovi laboron ordinare nur dum sezono plena je agrikulturaj laboroj. En sia infanaĝo, Ŝju-cung neniam sciis, kiel gustas faruno aŭ viando, eĉ en novjara tempo. En la plej bonaj okazoj la familio vivis je brano kun iom da legomoj. Aliokaze ili devis kontentiĝi je almozpetado de domo al domo.

Ŝajnas al Ŝju-cung, ke la plejparto de ŝia infanaĝo konsistis el malfeliĉaj tagoj. Ekzemple, estis tempo de superakvego kiam ŝi estis dekunu-jara. Ŝia patrino rifuĝis kun siaj tri filinoj en najbaran regionon, kie ili rekomencis sian almoz-peton. Sed ĉar la tuta regiono estis suferanta pro la superakvego, la kamparanoj apenaŭ trovis sufiĉe por satigi tiom da rifuĝintoj svarmantaj ĉi tien. Post dudek unu tagoj, la kvaropo fariĝis tiel malsatega ke iliaj kapoj turniĝis kaj okuloj nebuliĝis. En malespero, Ŝju-cung iris al la riverbordo kaj elfosis la herbaĵojn kreskantajn en la akvo. Kiam ŝi revenis, ŝiaj patrino kaj fratinoj estis tiel malsategaj ke ili formanĝis la tutan korbon da herbaĵoj, ne perdante tempon por ilin kuiri. Vidante la knabinojn lupe engluti la gluecajn kreskaĵoj la patrino flanken turnis kaj ekploris.

Estis malfacile por malriĉa familio subteni plenkreskintan knabinon. Kiam Ŝju-cung estis dekses-jara, ŝia patrino ŝin forvendis kiel novedzinon al familio en Pjenĉja-vilaĝo. Ŝia edzo estas mense malsana, dudek unu jarojn pli aĝa ol ŝi.

Kiam Ŝju-cung eniris la hejmon de sia edzo, ŝajnis ke ŝi saltis en inferon. La bopatrino mortis antaŭlonge. La bopatro estis maljunulo kun nenia aŭtoritato en sia hejmo. Regis en la familio la pliaĝa frato kaj lia edzino, kaj ambaŭ estis malindaj kaj egoistaj tiranoj. Ili amasigis ĉian laboron sur la nove venintan bofratinon, eĉ ne donante al ŝi sufiĉe da manĝaĵo. Se ia bagatelo malĝojigis ilin, ili incitis la idiotan edzon ŝin bati.

La edzo mem ne estis malbonulo, kvankam malsaĝa kaj infaneca. Li ŝin batis nur pro tio ke li ne kuraĝis malobei siajn fraton kaj bofratinon. Se la batado plorigis ŝin, li ankaŭ ploris. Kelkfoje li eĉ rifuzis bati ŝin, kio certe alportis la koleron de la pliaĝa paro al li mem. Sekve tri fojojn li saltis en puton por sinmortigi.

Finfine venis la tago, kiam Ŝju-cung ribelis kontraŭ laborado kiel sklavo en familio, kie ŝi eĉ ne ricevis sufiĉe da manĝaĵo. Kiam la edzo kaj bopatro provis ŝin defendi, la kolerigita paro elpelis la trion el sia domo. En divido de la famili-posedaĵo, la pliaĝa frato donis al ili du litroj da maldelikata greno kaj 1.9 mu-ojn (unu mu= 6.144 aro) da eluzita agro.

Han Ŝju-cung decidis vivteni siajn edzon kaj bopatron per si mem. Ŝi ne povis kulturi la kampon, ĉar ŝi havis nek semojn nek instrumentojn; ankaŭ mankis al ŝi scio de terkulturado. Plie, ŝia kampo bezonis grandan kvanton da sterko, kiun ŝi neniel povis aĉeti. Tial ŝi prunteprenis du arĝentajn dolarojn kiel kapitalon por komenci ŝpinadon kaj teksadon. Tamen en la malnova socio, eĉ se ekzistus cent vojoj por vivtenado, neniu estis malferma al la malriĉuloj. Kiam printempo venis, la mono kiun ŝi gajnis povis apenaŭ pagi la rentumon de la pruntita mono. Ŝi turnis sin jen dekstren, jen maldekstren, sed rezulte ŝi nur pli profundiĝis en ŝuldo. Fine ŝi povis fari nenion alian ol denove preni sian bastonon kaj iri almoz-petadi.

Malfeliĉaĵoj daŭris ataki la landon. La japanoj invadis Nord-Ĉinion, penetrante ŝian regionon. Jen senpluveco sekvata de superakvego venigis malsategon. Akompanante siajn edzon kaj bopatron, ŝi forkuris suden.

### LABORHEROINO

En la printempo de 1940, Pjenĉja-vilaĝo estis liberigita de la Okvoja Armeo. Kiam la novaĵo atingis Han Ŝju-cung, ŝi revenis al la vilaĝo kun sia familio, kiu nun inkludis sian infanfilinon. Kelkaj kadroj de la popola registaro ŝin vizitis. Ili havigis al ŝi semojn kaj instrumentojn por kulturi la 1.9 mu-ojn da tero kiun ŝi ricevis de la familio de sia edzo.

Kiam la semada sezono forpasis, la registaro ankaŭ helpis ŝin rekomenci ŝpinadon kaj teksadon. Ĉifoje ŝi ne estis enkatenigita de la peza rentumo, sekve ŝi komencis ŝpari iom da mono. Plej grave, kiel ŝi poste rimarkis, estis ke ŝi ricevis oportunon reakiri sian senton de digno per laboro. Finfine venis la tago kiam ŝi sentis tian firman fidon en la estonteco, ke ŝi prenis sian malnovan de hundoj morditan bastonon de almozulo kaj ĝin uzis kiel ekbruligaĵon por la forno.

En 1942, kiam la demokrata registaro alvokis la popolon plimultigi produkton, Han Ŝju-cung sin ĵetis al la tasko por organizi la vilaĝajn virinojn en produktan grupon por ŝpinado, teksado kaj ŝufarado. En la komenco ŝi povis konvinki nur ses virinojn por aliĝi al ĉi tiu entrepreno. La registaro pruntedonis al ili ŝtofon per kiu ili faris kvindek parojn da ŝuoj. Kiam la finitaj ŝuoj estis transdonitaj al la registaro, la virinoj ricevis profiton de pli ol dek kilogramoj da greno po paro. Tio tiel stimulis la ĝeneralan intereson, ke la sekcio por ŝufarado tuj pliiĝis ĝis dekses membroj.

Kiam la Virina Asocio estis fondita en la vilaĝo, Ŝju-cung estis elektita ĝia unua prezidanto. Post nelonge, ŝi estis elektita heroino de laboro ĉe distrikta popolamasa kunveno kunvokita en proksima guberni-urbo.

En la aŭtuno de 1944, la virina produkta grupo, kiun Ŝju-cung organizis, enkorpiĝis en la Taŝingĉeng-kooperativon. En la komenco ili teksis kanvason kaj materialon de krur-bandaĵoj por la armeo. Ĉe la fino de la unua monato la grupo gajnis profiton de $170, sufiĉe por distribui 30 kilogramojn da greno al ĉiu membro. Tio estis okulfrapa atestaĵo, montrante al aliaj virinoj en la vilaĝo, ke ili povis plibonigi sian vivon per produktado. Multaj virinoj venis al Ŝju-cung por helpo en la planado de siaj produktaj projektoj. Dume ŝi ankaŭ rondiradis en la najbaraj vilaĝoj kaj propagandadis la avantaĝon de organizita produktado.

De ĉi tiu tempo, la prestiĝo de la produkta grupo de Ŝju-cung pliiĝis senĉese. Post ses monatoj, en la printempo de 1945, la membraro altigis ĝis sepdek personoj, organizitaj, en subsekcioj po dekdu personoj. Tiam, tri kvaronoj de la vilaĝaj virinoj estis aliĝintaj al la Virina Asocio.

En 1945, Han Ŝju-cung estis nomita regiona heroino de laboro kaj partoprenis la Kongreson de Modelaj Herooj de Pohaj-regiono (la regiono ampleksas nordokcidentan Ŝantung-provinco).

### MODELA DISTRIKTESTRINO

Iun posttagmezo en Aprilo, 1946, kiam Han Ŝju-cung estis teksanta dome, la vilaĝa estro transdonis al ŝi paperon kun granda ruĝa sigelo sur ĝi stampita. Ĝis hodiaŭ, Ŝju-cung ne forgesas eĉ unu vorton skribitan sur tiu papero: En la dokumento estis skribita la jeno.

"Kamaradino Han Ŝju-cung estas per ĉi tio nomita vicdistriktestro de Ĉenvu-distrikto de Pohin-gubernio."

Sube estis la granda oficiala sigelo kaj subskribo de la komisario de Pohaj-regiono. Ŝi estis muta pro ĝojego. Pensu, ŝi, virino, kiu estis almozpetinta por dudekjaroj, povis fariĝi distriktestro:

La lastaj kelkaj tagoj antaŭ ŝia forlaso de la vilaĝo por la nova ofico estis plenigataj de serio da kunvenoj. Ĉiuj diversaj vilaĝaj organizoj celebris ŝian nomiĝon kaj deziris al ŝi ĉian sukceson.

Rapide Han Ŝju-cung konis plene la novajn taskojn kaj fariĝis kapabla administrantino. Ŝi povis tre lerte trovi la esencon de ĉiu nova movado, klarigi la novajn taskojn al la popolamaso tiamaniere, ke ŝi facile stimulis ilian politikan konscion kaj organizi la amasojn por plenumi ĉi tiujn taskojn efike kaj senprokraste. Tial ŝi liveris grandan helpon al ĉiuj kadroj distriktaj en la la kondukado de la agrarareforma movado.

Malgraŭ ke Ŝju-cung estis eksterordinare okupita pro la ĉiutaga administrado, ŝi penis trovi tempon por memlernado. En la daŭro de relative mallonga tempo, ŝi jam povis legi kaj skribi. Ekde tiu tempo ŝi kapablis legi la verkojn de Kamarado Maŭ Ze-tung kaj aliaj eminentaj gvidantoj marksistaj.

En la aŭtuno de 1947, la kuomintangaj reakciuloj mobilizis siajn fortojn laŭlonge de la Cingtao-Zinana Fervojo kaj norden puŝis. Ili entrudis Ĉenvu-distrikton, okupante pli ol 50 vilaĝojn el ĝiaj 70 vilaĝoj; la guberni-urbo estis okupita samtempe.

Kvankam la sano de Ŝju-cung estis tiam en malbona stato, ŝi rifuzis ĉiajn proponojn ke ŝi retiriĝu de tiu regiono al pli sendanĝera loko. Akompanate de kvin armitaj servsoldatoj, ŝi daŭris administri la distrikton kun ĝiaj 35,000 loĝantoj. Tage ŝi sin kaŝis kaj nokte iradis de vilaĝo al vilaĝo, kunvoki popolamasajn kunvenojn, organizi gerilan batalon, kaj mobilizi subtenon por la Popola Liberiga Armeo.

En Septembro, kiam la popolaj trupoj estis kontraŭ-atakantaj, ŝi persone gvidis brankardan korpuson al vilaĝo ĉirkaŭ unu kilometron for de la fortikaĵo de la malamiko. Uzante ĉi tiun vilaĝon kiel bazon, la brankardaj unuoj eliris por doni urĝan flegon al la vunditaj soldatoj laŭlonge de la batala fronto.

(daŭrigota sur p. 3)



***Baloto per Faboj*** *Ku Ĉun*

(Rim.: Grandparto el la kamparanoj ankoraŭ ne povas legi kaj skribi, tamen en la elektado de lokaj registaroj ili bone efektivigas sian rajton per faboj, t. e. asigni apartan pelveton por ĉiu kandidato kaj ĉiu vilaĝano enmeti sian fabon en pelveton de la kandidato, kiun li konsideras taŭga.)

# POPOLA EDUKO EN POPOLA ĈINIO

## VENLO FON

En la pasinto, al la popolamasoj de Ĉinio, precipe la laboristoj kaj kamparanoj, estis forrabita la ŝanco de edukiĝo, pro la peza subpremo de la reakciuloj. Tial en Ĉinio, la tiel nomata antikva lando de kulturo, la analfabetoj estis ĉirkaŭ sepdek procentoj el la tuta loĝantaro. Nun la popolo de Ĉinio jam fariĝis mem la mastroj. Ili devas liberiĝi ne nur de la politika kaj ekonomia subpremo, sed ankaŭ de la stato de senscio kaj malklereco. Estas do urĝa neceso la neniigo de analfabeteco kaj la altigo de la kulturnivelo de la laboristoj kaj kamparanoj. En ĉi tiu artikolo ni priskribos kelkajn el la novaj fazoj de edukado en Ĉinio: kontraŭanalfabeteca movado inter la kamparanoj kaj laboristoj, mezgradaj lernejoj por laboristoj kaj kamparanoj, libertempaj lernejoj kaj la Ĉina Popola Universitato.

### I. Vintraj Lernejoj en la Kamparo

Multo estis jam farita en la kamparo por neniigo de analfabeteco en la tri monatoj da intensa aktiveco en lasta vintro, kiam la kamparanoj havis iom da libertempo post la rikolto.

Vintraj lernejoj estis starigitaj, por kiuj la registaro organizis grandan nombron da instruistoj. Miliono da specialaj lernolibroj estis presitaj kaj grandaj kvantoj da papero kaj skribmaterialo estis provizitaj.

Sole en Manĉurio, pli ol 40,000 vintraj lernejoj estis starigitaj kaj en iu malproksima regiono de Ŝansi, statistiko montris, ke el 28,000 junuloj kaj junulinoj nur ĉirkaŭ 500 ne lernis en la vintraj lernejoj.

Ĉi tiu granda movado baziĝas kaj povas nur baziĝi sur la altigita vivnivelo de la kamparanoj. Post la agrara reformo, la kapablo legi, skribi kaj fari sian konton fariĝis neceso. Antaŭe, al la kamparanoj, kiuj havis nenian rajton alian ol labori kaj malsati, tia lukso kiel leg- kaj skrib-povo havis malmultan utilon.

Tian opinion klare esprimis kamparano en Fata-vilaĝo en Hejlongkiang. "En la estinteco," li diris, "mi laboris de mateno ĝis vespero por aliaj. Mi ne povis havigi al mi bonan vatitan litkovrilon. Mi havis nenian tempon por legi kaj skribi, kaj tio estus senutila al mi. Nun mi havas ĉevalon kaj ĉaron. Mi devas iri al foirejo por aĉeti. Estus vere granda bedaŭro por mi resti analfabeta."

Ĉi tiu Fata-vilaĝo estis tipa por movado amaseduka. Lastvintre, preskaŭ ĉiu en la vilaĝo povis aĉeti novajn vatitajn vestojn; ĉiu hejmo havis sufiĉe da greno kaj aliaj nutraĵoj konservataj. Estis ambaŭ libertempo kaj inklino por lerni.

Lastvintre ĉe Fata-vilaĝo, 260 plenkreskuloj, inkluzive 77 virinojn, lernis en vintra lernejo. En malmultaj tagoj, la loka kooperativo vendis kelkdek botelojn da inko, krajonojn, foliojn da papero kaj notlibrojn. Oni povis ofte vidi kamparanojn elpreni notlibrojn kaj ekskribi kelkajn ideografajn signojn—afero eĉ neimagebla antaŭe.

Ne estis enua rutino de lernado en ĉi tiuj vintraj lernejoj. La kamparanoj studis la enhavon de la loka ĵurnalo, la komunan programon de la Popola Politika Konsultiĝa Konferenco, semselektadon, irigacion, fekundigon, patrinan kaj infanan higienon kaj similajn subjektojn, ĉiujn de tuja valoro al ili. En ĉi tiuj lernejoj ili ankaŭ povis interŝanĝi spertojn kaj ellabori kuneproduktajn planojn.

### II. Libertempaj Lernejoj Kaj Mezgradaj Lernejoj

Dum la pasinta jaro pli ol 45,000 kadroj el laborista kaj kamparana origino studis en ĉirkaŭ 340 libertempaj lernejoj por funkciuloj en diversaj institutoj de provincaj, distriktaj kaj guberniaj niveloj en la kvar Nordĉiniaj provincoj de Hopej, Pingjuan, Ŝansi kaj Ĉahar. Ĉi tiuj lernejoj estas destinitaj por provizi laboristajn kaj kamparanajn kadrojn en la daŭro de tri ĝis kvin jaroj per la sama trejnado kiun lernantoj de regulaj lernejoj akiris en la daŭro de naŭ jaroj.

Post unu jaro da pli koncentrigita regula lernado, la kulturnivelo de la kadroj remarkinde altiĝis. Laŭ la rezulto de ekzamenoj okazigitaj en Tangŝan kaj Paoting en Hopej-Provinco, tiuj, kiuj estis analfabetoj aŭ konis nur kelkajn ideografojn nun konas ses- ĝis sep-cent signojn kaj ellernis la kvar elementajn operaciojn de aritmetiko kaj kelkaj jam povas skribi simplajn leterojn kaj raportojn. Tiuj, kiuj havis kulturnivelon de malsupera elementa lernejo, nun povas skribi simplan klaran lingvon kaj kontribui artikolon al ĵurnaloj. Parto el ili jam povas pli precize uzi interpunkcion kaj ellernis frakcion kaj proporcion en aritmetiko.

En Pekino, dekkvin mil industriaj laboristoj kaj kadroj nun studas en 21 libertempaj lernejoj lasttempe starigitaj. Ĉi tiujn lernejojn funkciigas aŭ la fabrikoj aŭ la diversaj lokaj distriktaj registaroj de Pekino. Komitato de libertempa eduko, estrata de Vicurbestro Vu Han, estas establita por gvidi la laboron en la tuta urbo. Pli da libertempaj lernejoj estas preparataj.

En Tangŝan, ekde Novembro de la pasinta jaro, ok regulaj libertempaj lernejoj por laboristoj establiĝis. Entute estas 3,720 lernantoj. Ili rapide progresas. Ekzemple, la unuajaraj lernantoj en la malsupera elementa lernejo de Tangŝana Fervoja Fabriko, kiuj estis antaŭe analfabetoj, post tri monatoj da lernado nun jam konas pli ol 300 ideografojn ellernis adicion, subtrahon kaj iom da multipliko. En ses jaroj la kulturnivelo de la analfabetoj povos altiĝi ĝis tiu de lernantoj diplomitaj de malsupera mezgrada lernejo*. Laŭ la plano, eliros el ĉi tiuj lernejoj dek mil laboristaj intelektuloj.

Ankaŭ en Kisi-karbominejo en la Nordoriento (Manĉurio), ege disvolviĝas eduko por la laboristoj. Establiĝis jam 31 libertempaj lernejoj. Partoprenas 5,721 lernantoj en 102 klasoj, ampleksantaj 37 procentojn el la tuta nombro de la laboristoj (15,475). Por tiuj iom kulturitaj la ĉefa lernado estas teknika, dum la akcesora estas politika kaj kultura. Por tiuj, kiuj staras je pli malalta kulturnivelo, la ĉefa lernado estas kultura dum la akcesora estas politika kaj profesia. Por la funkciuloj de la mino la ĉefa lernado estas politika, dum la akcesora estas profesia. El la lernantoj de la elementa klaso en la ĉefa maŝinfabriko, 40 procentoj jam povas skribi simplajn notojn, legi Laboristan Ĵurnalon; 35 procentoj ellernis 100 ĝis 250 ideografiajn signojn kaj simplan multiplikon; la ceteraj almenaŭ 50 ideografojn.

Krom altiĝo de kulturnivelo, ankaŭ altiĝis politika konscio kaj laborfervoro de la laboristoj. Multaj forĵetis siajn ideojn feŭdajn, superstiĉajn kaj fatalismajn kaj forbalais sian miskomprenon kontraŭ Sovetio kaŭzitan de la trompo de la imperialistoj kaj iliaj pupoj. Parolante pri Sovetio, la laboristoj intime nomas ĝin "Sovetio, nia pliaĝa frato".

En Tienzin, la eduka plano por ĉi tiu jaro enhavas la starigon de unu mezgrada lernejo por laboristoj kaj kamparanoj, 150 regulaj libertempaj lernejoj por laboristoj kaj 50 politiktrejnaj klasoj kaj 42 elementaj lernejoj.

Amaseduko pri kurantaj aferoj, politiko de registaro, populara scienco kaj higieno efektiviĝos kune kun la movado kontraŭ analfabeteco.

La unuaj kvar mezgradaj lernejoj por laboristaj kaj kamparanaj kadroj malfermiĝos kun 2,400 studentoj antaŭ Julio de ĉi tiu jaro en Mukdeno, Harbin kaj Dajren.

### III. Novtipa Universitato

Lekcioj komencis je la 13-a de Marto en la nova Ĉina Popola Universitato, kiu estis lastatempe malfermita en Pekino.

Kun sidejo en belega domego, kiu estis antaŭe princa palaco, kaj kun stabo de 130 profesoroj, lektoroj kaj instruistoj inkluzive Sovetiajn profesorojn kaj spertulojn, la universitato registris pli ol 1,600 studentojn, kiuj estas speciale elektitaj el la plej bonaj kadroj kaj laboristoj en ĉiuj ĉefaj urboj de Ĉinio. Pli ol duono el ili estas progresemaj industriaj laboristoj kaj revoluciaj kadroj kun jaroj da sperto, dum la ceteraj estas junaj intelektuloj el la Nordĉinia Universitato (kiu estas trejnejo por kadroj) kaj aliaj kolegioj de Pekino.

La intima kombino de lernado kaj praktiko, la studo de la spertoj de Sovetio estas la gvidaj principoj de ĉi tiu universitato de nova speco, kiel difinita de la Ministrio de Eduko. La celo estas provizi studentojn per ĝisfunda kompreno de Marksismo-Leninismo kaj mastrado de la teknika scio necesa al iliaj diversaj profesioj

La plena kurso daŭras du ĝis kvar jaroj en unu aŭ alia el la departementoj ampleksantaj ekonomikon, ekonomian planadon, financon, krediton, komercon, kooperativojn, fabrikadministradon, fremdlandajn aferojn kaj juro. Pli mallongaj kursoj pri la samaj subjektoj, daŭrantaj nur ses monatojn, estas ankaŭ aranĝitaj. Dujara ruslingva kurso ankaŭ estas komencita, dum specialaj institutoj estas starigitaj por studi Marksismo-Leninismon, kaj la problemojn de la ĉina revolucio, eduko, financo kaj ekonomiko, juro kaj fremdlandaj aferoj. Krome, la universitato havas sian propran traduksekcion, publikigan departementon kaj presejon. En la specializita trejnado por diversaj branĉoj de laboro, pli da tempo estas uzata sur praktika laboro ol en vizitado al kursoj, kun eksperimenta trejnado en fabrikoj kaj institucioj dum la vintraj kaj someraj ferioj.

* Ĉina lerneja sistemo: malsupera elementa lernejo, supera elementa lernejo, malsupera mezgrada lernejo kaj supera mezgrada lernejo po 3 jaroj kaj 4-jara universitato.



*Vintra Lernado en Vilaĝoj*

Tan Han

# VIDVINO TJEN GARDIS SIAJN KUKURBOJN

**— ĈAO ŜU-LI —**

La aŭtoro de ĉi tiu rakonto, Ĉao Ŝu-li, estas popola verkisto. Diligenteco, simpleco, intima rilatiĝo kun la amaso, kaj amo kaj fideleco al sia laboro estas lia valora karaktero. Li estas tipa verkisto venanta el la amaso kaj iranta en la amason. Li naskiĝis en la kamparo, vivis dum junaĝo en subpremata kamparana familio. Tiel li bone konas la kamparon, precipe la suferoj de la kamparanoj sub la subpremado kaj ekspluado de la feŭda klaso. Pro la doloro spertita de li persone, radikiĝis en li ekstrema malamo al la feŭda klaso kaj senlima amo kaj simpatio al la kamparana klaso. Tia sento plene esprimiĝas en liaj verkoj. Lia sinteno estas honeste servi al la amaso. Kiam ajn li faras amaslaboron, li ĉiam aperas kiel vera reprezentanto de la laboranta amaso. Tial li estas ĉiam bonvenata de ili. Kiam li kolektas materialojn por siaj verkoj, li havas la saman sintenon, t. e., li unuigas amaslaboron kaj materialkolekton. Tio estas ĝuste la kialo, ke li povas malkovri kaj solvi problemojn, kaj priskribi en siaj rakontoj modelojn kaj erarojn ĝenerale ekzistantajn en la laboro, por eduki la vastan kadraron kaj amason. Tio estas kial liaj verkoj trovas varman resonon en la koroj de la amaso kaj estas tiel ŝatataj de ili. Kelkaj el liaj konataj verkoj estas: "La Edziĝo de Nigruleto", "Popolrakonto de Li Joŭ-caj" kaj "Transformiĝo de Likja-Vilaĝo".

En la vilaĝo Nanpoĉuang estis multe da malriĉuloj, kaj pro tio kukurboj kaj faboj kreskantaj en la kampoj estis ofte forŝtelitaj. Estis tute senutile dungi homojn por ilin gardi. Ĉiu devis zorgi pri sia propra kreskaĵo. Tiu, kiu plej emis ŝteli, estis Ĉju Sen. Li ne havis sian propran agron kaj la kvin aŭ ses buŝoj en lia familio, enkalkulante liajn edzinon kaj infanojn, estis nutrataj ĉefe per sovaĝaj vegetaĵoj, kaj la ŝtelitaj kukurboj kaj faboj estis nur survoja akiraĵo. Tiu, kiu plej timis ŝteladon, estis Vidvino Tjen, ĉar ŝiaj kukurboj kaj faboj maturiĝis pli frue, kaj en Nanpoĉuang, inter la 30 ĝis 40 familioj, nur S-ro Vang kaj vidvino Tjen posedis legomĝardenojn, kaj kvankam la legomĝardeno de S-ro Vang mezuriĝis ĉirkaŭ dek muoj[1] dum tiu de Vidvino Tjen nur duona muo, tamen pro la granda potenco de S-ro Vang neniu kuraĝis lin priŝteli, kaj nature la malfeliĉo povis fali nur sur ŝin. Tiel, estis necese por Vidvino Tjen iri por gardi sian legomĝardenon ĉiujare en ambaŭ la somero kaj la aŭtuno.

En la printempo de 1946, Nanpoĉuang efektivigis la agraran reformon. Ĉar S-ro Vang estis bienulo, lia dek muoj da ĝardeno estis dividitaj inter la malriĉuloj. Kaj ĉar Vidvino Tjen estis mezkamparano, la duona muo da ĝardeno restis ŝia propraĵo. Kiam venis somero, ŝiaj kukurboj kaj faboj denove frue maturiĝis, kaj kiel antaŭe, ĉiutage ŝi iris gardi en sia ĝardeno. La infanoj al ŝi diris: "Ĉijare estas senbezone plu gardi. Ĉiu havas tiajn kreskaĵojn." Sed ŝi ne kredis al ili, ĉar ŝi neniam ien iris krom sian ĝardenon, eĉ ne sciante kie estas la ĝardeno de S-ro Vang.

Ne estis mirinde, ke ŝi ne kredis al la infanoj. Ŝi jam havis, multe da sperto. Dum la pasintaj jaroj Ĉju Sen kaj lia bando kvazaŭ ĉiam ŝin petole ĉagrenis, kiam ajn ŝi foriris de la ĝardeno, io estis forprenita.

Foje, ŝi iris hejmen por alporti pelvon da rizo kaj reveninte trovis Ĉju Sen ĉe la rando de ŝia ĝardeno. Kaj Ĉju Sen petegis al ŝi: "Pliaĝa bofratino[2] Donu al mi kukurbon—nur iun malgrandan. Miaj infanoj estas malsataj!" En malbona humoro, ŝi diris intence: "Kie estas ili troveblaj? Ŝtelistoj jam ĉiom forprenis!" Ĉju Sen sciis ke la vortoj celas al li, tamen li ne kuraĝis kontraŭdiri, sed daŭre petis al ŝi. Vidvino Tjen ankaŭ ne kuraĝis pli profunde lin ofendi, timante lian pluan ŝteladon. Tamen, rigardante al siaj kukurboj junaj kaj delikataj, si volis deŝiri neniun el ili. Ŝi selektadis dum longa tempo kaj finfine donis al li kukurbon grandan kiel pugno, murmurante: "Kia domaĝo! Ĝi estas ankoraŭ kreskanta!"

Tuj post kiam ŝi forsendis Ĉju Sen, tie venis S-ro Vang ĝentile svingante sian ventumilon. Direktante sian fingron al la dorso de la foriranta Ĉju Sen, li al ŝi diris, "Kia minaco! Kia minaco! Depost kiam troviĝis tiaj homoj en la vilaĝo, paco forlasis nin por ĉiam!" Tion dirante li preterpasis sen halto.

Tiuj vortoj tiel precize resumis ŝian korĉagrenon, ke ŝi neniam povos ilin forgesi. Tial, kiam la infanoj diris: "Ne estas bezone plu gardi ĉijare," ŝi simple ne povis kredi.

Tamen, ĉu ŝi kredis al tio aŭ ne, fakto restis fakto. Iutage, ŝi suferis de sunfrapo kaj estis devigata resti sur lito por tri tagoj. Kaj kiam ŝi plufoje iris al la ĝardeno, ŝi trovis nenion perdita! Si volis rekomenci la gardadon post sia resaniĝo, sed aferoj hejme unu post la alia detenis ŝin de iro. Ŝi vizitis la legomĝardenon unufoje po tri aŭ kvin tagoj, kaj trovis ĉion netuŝita. Poste ŝi ĝin vizitis unufoje po ok ĝis dek tagoj kaj ankoraŭ trovis nenion perdita. Finfine, ŝi nur markis per krucsignoj tiujn kukurbojn restantajn kaj decidis forlasi entute la gardadon.

Iutage, finonte la aŭtunan rikolton, ŝi iris al hejmo de Ĉju Sen kaj vidis kelkdek kukurbojn kuŝantaj en la korto. Inter ili estis du kun krucmarkoj, ĝuste similaj al tiuj kiujn ŝi faris sur la siaj. Suspekto denove naskiĝis en ŝia koro. Ŝi dezirus fari kelkajn demandojn, sed ŝi timis, ke sen sufiĉa atesto tio kaŭzus malagrablaĵon. Tial ŝi decidis unue iri al sia ĝardeno por vidi. Ŝi eĉ ne hejmen iris kaj rekte rapidis al la ĝardeno.

Survoje ŝi renkontiĝis kun Ĉju Sen, pelante bovoĉaron plenan de kukurboj. Ŝi demandis kun surprizo: "Kies kukurboj estas tiuj ĉi? Tiom granda kvanto!

Kaj Ĉju Sen respondis: "La miaj! Mi kreskigis tro multe da kukurboj!"

"Do kial vi tiel multe kreskigis?"

"Vi scias, miaj infanoj tiel sopiris al kukurboj la antaŭajn jarojn, ke mi diris al mi mem kiam mi akiris mian porcion de duona muo da tero, ke mi kreskigos nenion sur ĝi krom kukurboj. Kiu sciis, ke mi rikoltos tiom da tiuj grandegaj stultaĵoj, ke ni ne povas ilin finmanĝi. Kiel profite, se mi estus kreskiginta anstataŭe, grenojn!"

"Ĉu vi ne povas iom vendi, se vi ne povas ĉiom finmanĝi?"

"Vendi! Al kiu mankas tia manĝaĵo ĉijare? Kie mi trovos aĉetantojn? Kaj ankoraŭ estas pluaj kukurboj en mia ĝardeno! Se vi ilin deziras, sendu vian infanon por iom porti. Estinte ni ja ĉiam manĝis la viajn!"

Tion dirinte, Ĉju Sen iris for sur sia ĉaro, kaj Vidvino Tjen ne plu sentis la bezonon iri vidi siajn kukurbojn.

---

1) muo: ĉina mezurunuo=6.144 aroj.

2) pliaĝa bofratino: ĝenerala salutnomo por virino.

## NI KUNSIDAS

*—Ho Ta—*

En kunsido,
La okuloj niaj
Koncentriĝas sur la akso
Kiel radioj.

Kun la dorsoj
Al ekstero,
En kunsido
Fariĝas ni kastelo.

En kunsido,
El animar' amika,
Kunplektita,
Estiĝas ŝnuro dika.

Vizaĝe kontraŭ
Komuna sorto,
En kunsido
Ni fariĝas gigant-forto.

## LIBERO AL NI VENAS

*—Tjen Kjen—*

Malgaja
Popolo,
Ni nepre devas bataladi!
Septembre ekster la fenestro
Sur la kamparo
De Azi',
Libero
El trans sang-inundo,
El trans kadavroj frataj
Alflugas al ni
Kiel tempesto;
Kiel hirundo.

## BRANKARDO

*—Aj Ĉing—*

Kiam li rekonsciiĝis,
Li kuŝis jam sur la brankardo.
Li sciis ke, jen vivas li ankoraŭ.
Du kamaradoj portis lin surŝultre
Kaj ambaŭ iris sen parolo.

La aero frostis en la vento kruda.
Nuboj trenis sin malalte, peze.
Arbopintojn skuis blovo muta.
Kun lia brankardo
Ili rapidpaŝe
Pasis tra l' arbaro nuda.

Post momento de akrega bruldoloro
Nun jam kvietiĝis lia koro,
Kiel post terura sanga scen'
Nun kviete kuŝis la teren'.

Tamen la sango
De lia brako, tra l' bandaĝo
Ankoraŭ gute gute
Faletis sur la vintran vojon de la ter' patria.
Kaj samvespere,
El kontraŭa direkto de brankardo lia,
Dekoble granda kaj majesta kolonaro
Per dekmil piedoj
Forviŝis la signojn purpurajn de lia sangfalo.

## ĈI-CEN-KŬAN

*(Popolkanto)*

Ĉi-Ĉen-Kŭan, la templo
Plenas de plezuroj.
Pinoj kaj cipresoj kreskas sur la ŝtontabuloj,
Se ŝtontabulojn oni levus,
Ili ja kreskas sur la dorso de la mizeruloj.

*Trad. S. J. Zee*


Aŭskultu disaŭdigon de

**PEKINA RADIO**

Ĝi disaŭdigas ĉiutage programojn en:

| | |
|---|---|
| *Japana lingvo* | *10.00—10.30 GMT* |
| *Indonesia lingvo* | *10.30—11.00 GMT* |
| *Vietnama lingvo* | *12.00—12.30 GMT* |
| *Angla lingvo* | *13.30—14.00 GMT* |
| *Siama lingvo* | *14.00—14.30 GMT* |
| *Birma lingvo* | *15.00—15.30 GMT* |

je jenaj ondolongoj kaj frekvencoj:

| | |
|---|---|
| *428.57 metroj:* | *700 kilocikloj* |
| *29.24 metroj:* | *10.26 megacikloj* |
| *19.92 metroj:* | *15.06 megacikloj* |

Skribu al la Radiostacio pri viaj impresoj de la enhavo kaj pri la aŭdebleco de la disaŭdigo.


## Maja Tago...... *(daŭrigo de p. 1)*

malfermiĝis por la ĝuo de la komunaj popolanoj kiuj ilin kreis. Tio simbolas la grandajn politikajn ŝanĝojn en Ĉinio, kun la laborantaj popolanoj firme postenantaj kiel mastroj en sia lando.

Peonioj, siringoj, sovaĝaj rozoj kaj glicinioj en plena florado aldonis gajecon al la vidaĵo, kiam amasoj pasis tra la enirejo sub montrotabulo surskribita de Prezidanto Maŭ Ze-tung per la jenaj vortoj: "Pekina Laborista Palaco de Kulturo." La amasoj iris al la librejo kiu havas legoĉambron por 200 homoj kaj milojn da novaj libroj kaj gazetoj.

La granda centra palaco, kiu alte staras super la aliaj, estas uzotaj kiel vasta kunvenejo, dum ambaŭflanke kelkaj pli malgrandaj konstruoj entenas la diversajn klubĉambrojn ekipitajn por ĉiuj specoj de endomaj ludoj kaj ekspozicioj montrantaj la vivon kaj laboron de ĉinaj kaj sovetiaj laboristoj.

Kvar pli malgrandaj konstruoj malataŭ la ĉefa halo estas dediĉitaj al la artoj, po unu por muziko, belartoj, danco kaj dramo, ke la laboristoj en sia libertempo venu kaj vidu prezentadojn kaj mem ricevu trejnadon.

Sportkampoj por diversaj ludoj estas aliĝitaj al la kultura centro, ekster la muroj ĉirkaŭantaj la ĉefan konstruon, kaj tie, ankaŭ, eksterdoma teatro por 4,000 homoj estas konstruata.

Por kvieta diskuto aŭ paca promeno, ombro, plena plezura terspaco estas pretigita laŭ longe de la bordoj de kanaleto.

Ĉi tiu palaco de kulturo estas pli grandskalased simila al la kulturaj centroj kiuj jam establiĝis en Tienzin kaj la ĉefaj urboj de Manĉurio. Ĉi tio servos la laboristan klason, kiel Li Li-san, Vicprezidanto de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, diris en sia parolado ĉe la malferma ceremonio de la palaco, ne nur en altigo de la nunaj kulturniveloj sed en kreado de plej alta formo de homa kulturo en la popola epoko.

# NOVA TIPO DE KAMPULA GASTEJO

Ke Ĉia-lung

Frumatene, maljuna kampulo nomata Pan Lao-ĉung kun tri el siaj najbaroj atingis Ŝihĉiaĉuang, fervoja merkat-centro de Hopei-provinco. Ili venis por negoco, kunportante 1,000 ĝinoj* da batatoj por vendi.

Survoje al la bazaro ili hazarde preterpasis la Kampulan Gastejon. Aŭdinte pri tiu loko, ili haltis en ĝi kaj demandis. Sed, kiam oficisto diris al ili, ke la gastejo povas trakti la vendadon de ilia varo, la kvar viroj rigardis dube unu la alian, ili ĉiuj estis egale suspektemaj pri iu ajn urbano, kiu proponis helpon al ili. Kaj fine Pan Lao-ĉung murmuris: "Pli bone ni iru kaj faru la negocon ni mem."

Ĉe ilia foriro la oficisto de la gastejo certigis ilin pri tio, ke la organizo estus ĉiam preta ilin helpi, kiam ili tion bezonus.

La maljunulo kun sia grupo ne multe sukcesis tiun tagon, kiel tio ofte okazis en la pasinto. Ili prezentis la tutan kvanton de siaj batatoj al kelkaj nutraĵ-butikoj, sed la proponitaj prezoj estis tro malaltaj. Fine ili iris al la publika bazaro kaj komencis vendi sian produktaĵon pomalgrande. Ili pasigis en la bazaro la tutan tagon, marĉandante kun ĉiu aĉetonto. En malfrua posttagmezo, kiam la bazaro estis fermata, restis ankoraŭ pli ol 400 ĝinoj ne venditaj. Kvankam ili malaltigis la prezon por la forvendo, tamen malmultaj aĉetantoj interesiĝis. La kampuloj maltrankvile sopiris reveni hejmen en la sekvonta frumateno, sed en tia cirkonstanco ili apenaŭ sciis kion fari. Tiam ili ekmemoris la gastejon.

Kiam Pan Lao-ĉung rakontis sian aferon al iu el la oficistoj de la gastejo, la lasta tuj telefonis al konsumado-kooperativo. Kaj la restanta kvanto da batatoj rapide forvendiĝis en kontento de ambaŭ flankoj.

---

La Kampula Gastejo estis fondita en Ŝihĉiaĉuang en Februaro, 1949, de la Konsilio de la Kooperativa Asocio, kun la subteno de la loka popola registaro. Ĝi estas nova tipo de gastejo aranĝita por la nova rilato formiĝanta inter urba kaj kampara regionoj. Du servojn la gastejo celis: liberigi la kampulojn el la ekspluatado de la makleristoj, kiam ili iras al la urbo por aĉeti industriaĵojn kaj vendi siajn agrikulturajn produktaĵoin; kaj provizi komfortan ripozejon por la kampuloj dum ilia restado en la urbo.

La loĝo estas senpaga, kaj la manĝo malpli kostas ordinare 35 procentojn malpli ol la prezo de la stratajn vendistoj. Se iu speciale ŝparema kampulo volas mem kuiri la manĝaĵon kiun ili kunportas el sia hejmo, la gastejo disponigas al li senpage la kuirejon.

Tamen la gastejo sukcesas funkcii per siaj propraj enspezoj. La konstruaĵo kaj mebloj estas provizitaj de la registaro, kaj tiel ĝi fakte ne havas altan elspezon. Ĝia enspezo venas el la vendado de ĉiutagaj necesaĵoj al la kampuloj-klientoj. Ĉi tiuj varoj estas ricevataj el la ŝtataj entreprenoj per virtuale kostprezo, kaj pro tio la gastejo povas akiri malgrandan profiton malgraŭ ke ĝiaj varoj estas vendataj multe pli malkare ol la ĝenerala merkata prezo.

---

Nun ni turnu nin al Pao Lao-ĉung. Li estis kompreneble tre dankema pro la helpo ricevita ĉe la vendo de batatoj,—fakte tiel dankema, ke li eĉ hezitis ĝeni la oficistojn de la gastejo per pli da problemoj. Sed li ankoraŭ volis aĉeti novan ĉarradon, kaj tial li eliris por serĉi. Unue estis malfacile por li trovi vendistojn, kaj poste li trovis la prezon eksterordinare alta. Kiel ordinare, kiam la urbaj komercistoj vidis ke venis negoco kun kampulo, kiu estis nesperta pri la merkato, ili levis la prezojn. Fine Pan Lao-ĉung revenis al la gastejo kun malplenaj manoj.

Kiam la oficistoj de la gastejo aŭdis pri lia klopodo senfrukta, ili volontis fari la aĉeton por li. Per telefonado al ferfandejo sciiĝis, ke ĝia prezo estas nur duono de tio kion oni al li postulis. Pan Lao-ĉung mendis la ĉarradon, kaj ĝi estis liverita al la gastejo tiun vesperon. Li kaj liaj amikoj aĉetis de la gastejo petrolon kaj diversajn aliajn necesaĵojn. Ili ankaŭ aĉetis ĉaron da karbo 10 procentojn malpli ol la merkatoprezo. Ĉio ĉi tio ŝparis por ili kaj monon kaj tempon.

Post tio la kvar kampuloj havis varman vespermanĝon kaj dolĉan dormadon sur puraj litoj.

Matene kiam venis la tempo por ili pagi al la gastejo, Pan Lao-ĉung volis iom aldoni "kiel signo de dankemo". Sed la bonvolan donacon la oficistoj de la gastejo firme rifuzis. Ĉe la foriro de la vizitantoj, la maljuna Pan frapis unu el la oficistoj sur la dorso kaj diris:

"Amikoj, vi vere servas por ni kampuloj. Pri ĉi tiu loko mi rakontos al ĉiu kiu venos al Ŝihĉiaĉuang. Ĝi estas kvazaŭ hejmo por ni en la urbo."

---

Tio estas kaŭzo, kial la gastejo kreskis tiel rapide en unu jaro. Sennombraj kampuloj kiel Pan Lao-ĉung spertis la surprizon, ke ili trovas helpeman amikon en ĉiu el la oficistoj de la gastejo, kiam ili iras al la urbo.

La Kampula Gastejo en Ŝihĉiaĉuang tiel sukcesis, ke ĝi ekestas rigardata kiel modelo. Gestejoj de la sama speco nun floras en preskaŭ ĉiuj urboj. La kampulaj gastejoj jam fariĝas esenca parto de la kooperativa movado kiu cementas la novan interrilaton inter la urbo kaj la kamparo, tiel kreante solidan fundamenton por nova kaj prospera Ĉinio.

Trad. Jungsen Jang

---

*Ĝin-o: Unuo por pezo de Ĉinio. egalas 500 kg.

# KULTURAJ NOTOJ

Gŭangming-tagĵurnalo, , la organo de Ĉina Demokrata Ligo, de la 17-a de aprilo ekaperigis ĉiu-semajne specialan paĝon "Nova Lingvo" por diskuti lingvajn problemojn, precipe pri reformo de ĉina lingvo. En ĝia unua numero aperis ankaŭ artikolo "Esp-a Movado en Ĉinio", verkita de K-do Dio, rakontanta ĉefe esperantajn laborojn en Nova Ĉinio.

* * *

Post la liberiĝo de Ŝanhajo, esperantistoj en tiu urbo tuj sin reorganizis kaj refondiĝis en lasta aŭgusto Ŝanhaja Esperantista Ligo (ŜEL). Komence ĝiaj membroj nombris nur 54, kaj nun plimultiĝas ĝis pli ol 200.

* * *

Kunlaborante kun ŜEL, "Amasa Librejo" en Ŝanhajo eldonas monatan gazeton "Popola Mondo." Ĝi estas parte ĉinlingva kaj parte esperanta. Nun eldoniĝis jam la tria numero. Legantoj volu adresi al Ŝanhaja Esperantista Ligo, Poŝtkesto 636, Ŝanhajo, Ĉinio.

* * *

Popola Radiostacio en Ŝanhajo tre interesiĝas pri disvolviĝo de esperanta movado. Ekde lasta oktobro, ĝi invitis ŜEL-on disaŭdigi paroladojn pri Esperanto en ses sinsekvaj tagoj. Kaj poste ĝi decidis akcepti tiajn paroladojn kiel ĝia regula programo tri fojojn semajne.

* * *

Dek naŭ fabrikoj kaj minoj jam starigis libertempajn lernejojn por laboristoj en Tatung, karboprodukta centro en Norda Ĉinio. Karboministoj de Koŭĉuan-mino jam organizis 40-minutajn lecionojn ĉiumatene apud la ŝaktoj antaŭ la komenco de laboro en la ŝaktoj.

* * *

La Popola Provinca Registaro de Pingjuan jam establis kvar teknikajn kolegiojn, speciale por inĝenierado, agrikulturo, medicino kaj ekonomio, por trejni spertulojn por la ekonomia rekonstruo de Ĉinio. Meza lernejo ekskluzive por laboristoj kaj kamparanoj ankaŭ malfermiĝis la 20-an de aprilo.

LEGU ANGLALINGVANOJ

*la gazeton duonmonatan*

# "People's China" (POPOLA ĈINIO)

(Vivanta Kroniko de la vivo kaj Penso de nova Ĉinio)

Jen kelkaj el la titoloj de artikoloj kiuj aperis en ĝiaj pasintaj numeroj:

## Pri Politiko:

- Diferenco Inter Sovetia kaj Usona Eksteraj Politikoj....Sung Ĉing Ling (S-ino Sun Jat-sen)
- Pri la Rolo de la Nacia Burĝaro en la Ĉina Revolucio....Ju Huaj
- Dek Jaroj de Nova Demokratio verkita de Mao Ze-tung....Hu Ŝeng
- Tremu la Imperialistoj....Ĉien Ĉun ĵui
- Politiko de Ĉinio Pri Naciaj Minoritatoj....Veng Tu-ĉien

## Pri Ekonomio, Financo kaj Industrio:

- Ĉinio Traktas Siajn Financajn Problemojn....Jang Pej-hsin
- Ĉina Agrikulturo en Rapida Restarigo....Tien Ho-nung
- La Movado de Nova Rekordo en Manĉurio....Fan Kung-ming
- La Rekord-rompa Restarigo de Fervojoj en Ĉinio....Liu Hsin-hua
- Organizitaj Kamparanoj Konkeras Naturon....Ĉeng Lien-tuan

## Pri Laboristoj, Virinoj kaj Junuloj:

- La Laborista Movado en Ĉinio....Li Li-san
- Ĉiniaj laboristoj Konstruas Novan Landon....Liu Ning-ji
- Ĉao Kuo-ju Rompas la Rekordon....Lung Men
- Ĉinaj Virinoj Helpas Konstrui Novan Ĉinion....Teng Jing-ĉao
- Unua Jaro de la Nov-Demokrata Junula Ligo....Feng Ven-pin

## Pri Eduko, Literaturo kaj Arto

- Eduko kaj Kulturo en Nova Ĉinio....Lu Ting-ji
- La Unueca Fronto en Literaturo kaj Arto....Kuo Mo-ĵo
- Orient-eŭropa Literaturo en Ĉinio....Mao Tun
- Drama Movado en Nuntempa Ĉinio....Ĉang Keng
- Novjaraj Bildoj—Popola Arto....Caj Ĵo-hung

* * * * *

Abonu ĉe ***26, Kuo Hui Chieh, Peking, China.***

**La abonkostoj estas:**

*Usono kaj Kanado: US$4.00 por unu jaro aŭ US$2.20 por ses monatoj.*
*Britio kaj Brita Imperio: £1 por unu jaro aŭ 11/- por ses monatoj.*
*U.S.S.R: 20 rubloj por unu jaro aŭ 11 rubloj por ses monatoj.*
*Hindio, Malajio kaj Hongkong: HK$16.00 por unu jaro aŭ HK$8.80 por ses monatoj.*
*(Afrankon inkluzive)*

# ABONMANIERO

1 Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas daŭre ricevadi nian gazeton, volu pagi laŭ la tarifo.

2 Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-gazetoj ni volonte interŝanĝos reciproke periodaĵojn aŭ librojn.

3 Respond-kuponon ni ankaŭ akceptos kondiĉe ke inter tiu lando kaj Popola Ĉinio stariĝas jam diplomatia rilato.

## Abontarifo

| Por legantoj en | Prezo de 6 numeroj | Prezo de 12 numeroj |
|---|---|---|
| U. S. S. R. kaj Orienta europo | 3 rubloj | 6 rubloj |
| Britio | 3 ŝilingoj | 6 ŝilingoj |
| Sudmaraj Insuloj kaj Hongkong | HK $ 3.00 | HK $ 6.00 |
| Usono kaj Kanado | US $ 0.65 | US $ 1.25 |

***Rim. 1 Sendkoston inkluzive, rekomendon ekskluzive.***
***2 Legantoj en ceteraj landoj povas aboni laŭ prezo por Usono.***

國內定價：每期基價一元五角全年12期基價十八元郵費在內

北京軍事管制委員會臨時登記證新字第一二〇號